

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 6/2005 ★ ISSN 0032-2431

Nokto de Dia Naskiĝo

En la krepusko de la nokto
super la Paŝtista Kampo ekbrilis
Lumo pere de la senfina mistero
de la Amo.

La nokto – plej sankta – unika
inter ĉiuj noktoj
plenigas per la lumo de la Vorto
la tutan teron.

La nokto – per la sopiro de la jarcentoj peza
leviĝas el la tristaj genuiĝoj de malforteco
en la pastoraloj de kantantaj steloj
en la brilo de la ĝojo.

Mallumo per senespero de la jarcentoj
ploreganta –
endormiĝas en la kontemplado de la rideto
en la silento de la naskiĝo de Kristo Sinjoro.

Malfido – per la preĝa fido
antaŭkuras al la renkontiĝo de la Vero:
Dio fariĝis homo
por instrui nin reciprokan
amon.

La nokto de Dia proksimeco
trapenetas ĉion kaj ĉiujn
per la Amo.

6
2005

Enhavtabelo:

| | |
|--|---|
| 3 | Interparolo kun Tomasz Chmielik <i>Kazimierz Leja</i> |
| 10 | Aforismoj <i>Urszula Żybura</i> |
| 11 | Henryk Sienkiewicz – La Kruckavaliroj <i>Tomasz Chmielik</i> |
| 15 | Historia manuskripto de Zamenhof <i>Aleksander Korjenkov</i> |
| 20 | Preskaŭ ĉio pri la prepozicio SUB <i>Czesław Baranowski</i> |
| 22 | Ĉiu esperantisto... <i>Rikardo Ŝulco</i> |
| 31 | Kvizo <i>Katarzyna Tempczyk</i> |
| 23–32 | El la Movado... <i>diversaj aŭtoroj</i> |
| Kovrilpaĝo: „Nokto de Dia naskiĝo“ <i>Leszek H. Łęgowski / Bogusław Sobol.</i> | |

*Por ĉiuj legantoj
de Pola Esperantisto,
plensukcesan, sanan kaj feliĉan
Novan – 2006 – Jaron
deziras*

la redaktoro

Redaktoraj vortoj

La lasta ĉijara numero de la revuo, kvankam abunda je diversaj informoj (tiom ŝatataj de la postresto de pola esperantistaro) enhavas ege valoran kaj signifoplenan – laŭ mia opinio – intervjuon kun la venontjara kunredaktoro, Tomasz Chmielik. Se vi ne al kutimiĝis ankoraŭ legi atenteme, provu fari tion tiukaze.

Venontjare ni planas kaj festi, kaj omaĝi 100-jariĝon de *Pola Esperantisto*. Super ĉio, tamen, ni ĉiuj provu, eble lastfoje, plibonigi nian agadon, aŭ – simple – komenci ion ajn fari...

Kazimierz Leja

Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 6/2005 – ISSN 0032-2431
eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

Redaktoro: Kazimierz LEJA

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro.

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

La redaktoro rezervas al si rajton mallongigi kaj redakti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź,
str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:
UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6 EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

Interparolo kun Tomasz Chmielik

*vic-prezidanto de Esperantlingva Verkista-Asocio kaj
membro de Esperanta PEN-Centro, pri lia esperantistiĝo,
esperantisteco, fascinoj, traduka kaj eldona agadoj kaj...
multaj aliaj*

[KL] Kara Tomasz, sen superflujaj demandoj, rakontu pri viaj esperantistaj spertoj.

[TCh] Mi esperantistiĝis en 1972 en la koresponda kurso, organizita de Pola E-Asocio en Varsovio. En la jaroj 1976-1979, dum mi estis studanta la germanan filologion, mi prezidis en Lublino la Vojevodian Filion de PEA. Samtempe mi aktivis en laboroj de Orientalisma Studenta E-Rondo, kiu estis integre ligita kun PSEK. De 1980, kiam mi komencis labori kiel instruisto de germana lingvo en la Svidnika liceo, mi gvidas regule E-kursojn por miaj gelernantoj. De 1986 mi venadas al KCE en La Chaux-de-Fonds, kie mi gvidis plurajn kursojn, instruante Esperanton al komencantoj kaj progresantoj. Mi ankaŭ prelegis pri la historio de Esperantaj literaturo, movado kaj idearo.

Vere, vi estas pli bone konata eksterlande, ol en nia lando... Kio influis vian eksterlandan aktivecon?

En somero 1989, kiam mi vizitis la Urban Bibliotekon en La Chaux-de-Fonds mi trovis la celon por miaj esploroj pri-Privataj. Claude GACOND alportis kelkdekon da kovertegoj, kiuj

entenis miksite franclingvajn artikolojn de Edmond PRIVAT, publikigitajn en la jaroj 1916-1962. Unue mi ordigis ĉiujn ĉi artikolojn laŭ la jaroj kaj gazetoj. Sekvis fotokopiado. Tiel ekestis du kolektoj. Kolekto de la originalaĵoj, kiuj restas ĉe CDELI metitaj en skatolojn kaj kolekto de la fotokopiaĵoj. Tiu fotokopia kolekto migris al Pollando, kie dum ses jaroj mi enkomputiligis ĉiujn haveblajn artikolojn. Nun la tuta kolekto troviĝas sur disketoj kaj kompaktaĵoj. Sed ordigante la artikolojn mi rimarkis multajn mankojn. Tio instigis min al plia serĉado dum miaj sekvaj restadoj en CDELI kaj en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno. Mi povis konsulti la jarkolektojn de la gazetoj, kun kiuj kunlaboradis PRIVAT: *La Sentinelle*, *Le Droit du Peuple*, *Le Travail*, *Le Coopérateur genevois*, *Coopération* kaj *L'Essor*.

Post iela-tiela kompletigo mi preparis la artikolojn el la nomitaj revuoj por multobligo forme de kajeroj. Mi dividis la jarajn kolektojn de *La Sentinelle* (1920-1956), *Le Droit du Peuple* (1919-1935) kaj *Le Travail* (1922-1935) en la kajerojn duononjarajn: JAN-JUN kaj JUL-DEC, kaj en la jarajn: JUN-DEC la kolektojn de *Le Coopérateur ge-*

nevois (1929-1944), unue *La Coopération* (1921-1922, 1930-1949), kaj poste de *Coopération* (1950-1962) kaj de *L'Essor* (1916-1919, 1931-1932, 1934-1962). Interkonsentite kun Claude Gacond mi redaktis komence la franclingvan eldonon. Ĝi estas ampleksa. Ekzistas du kolektoj: „granda” kun indeksoj persona kaj tema, kiu celas historiistojn, kaj „malgranda” sen indeksoj, kiel legolibrego. La tutan kolekton de la Privataj artikoloj el la nomitaj gazetoj formas 155 volumoj. La nombro da paĝoj sumiĝas al 55.000!

Mi pensas, ke ĝuste la artikolaro estas plej grava kaj rimarkinda verko de nia Romanda pioniro. Ni havas la unikan ŝancon vidi politikajn kaj kulturajn okazintaĵojn en la tuta mondo, de 1916 ĝis 1962, per la okuloj de esperantisto. Privat neniam forgesis enŝovis siajn raportojn pri ĉiujara Universalaj Kongresoj de Esperanto en tiujn socialismajn kaj kooperativajn gazetojn. Tiel la franclingva svisa legantaro observis kiel progresas la lingvo internacia.

Mian laboregon mi ne povus efektiviĝi sen helpo de Claude Gacond, dank’ al kies malavara helpo mi povis ĉiujare restadi du-tri monatojn en CDELI kaj al la favoro de la vic-direktorino de la Biblioteko en La Chaux-de-Fonds, Sylvie Béguelin, kiu disponigis al mi ĉiujn haveblajn materialojn kaj permesis fotokopiadi artikolojn. Mi povas diri, ke Claude faris el mi esperantiston. Ne sufiĉis, ke mi ekkonis lingvon, mankis la animo. Ĝuste ĉi animon donis al mi Claude. Mi envas lin, ĉar en sia junaĝo li havis okazon renkontiĝi kun Privat, interparoli kun li. Neforgeseblaj por mi

estos teopaŭzoj en CDELI, dum kiuj mi eksciis plej multe pri Privat, pri la historio de Esperantujo. Claude estas mirinda instruisto. Kun tempopaso, iom post-iom mi fariĝis adepto de Privat. Claude estis mia gvidanto kaj majstro. Mi pensas, ke la Privata cirklo fermiĝis en mia laboro. Kun Claude kaj lia ĉarma edzino, Andrée, mi kun miaj edzino, Danka, kaj filo, Tomek, tramigris la tutan Svislandon. Claude kaj Andrée, instruadis al mi amon al la svisaj historio, kulturo, pejzaĝo kaj montaro, en kiu troviĝas mia revo-valo Lötschental. Mi povas diri kun plena konvinko, ke La Chaux-de-Fonds fariĝis por mi urbo magia, kaj Ĵuraso – lando fabela.

Mi ne forgesu ankoraŭ unu nomon: Andy Künzli, granda amiko, ŝatanto de la slava mondo kaj juda kulturo. Mi vizitas lin en Berno, kaj li venas al Świdnik, kaj tiam ni sekvas la spurojn de judaj dibukoj, fantomoj, ŝtetloj en la orienta parto de Pollando. Mi admiras sciojn kaj konojn de Andy. Li estas tre bona kamarado por bierumado, dum kiu ni povas disputi longajn horojn, ĝis la hela mateno. Ankaŭ mi estas granda ŝatanto, trinkanto kaj konanto de la plej diversaj bieroj, sed tiu ĉi trinkaĵo de la nordaj dioj dikigas, sed pri tio – ŝŝŝ...

En La Chaux-de-Fonds estas la magia adreso: rue des Postiers 27. Ĉe tiu ĉi strato troviĝas Kultura Centro Esperantista. La loko mirinda, tiom da tagoj mi pasigis tie, instruante Esperanton, historion de Esperanta literaturo, prelegante diversteme. La plej gravaj por mi ĉiam estis la homoj, kun kiuj mi renkontiĝis tie, interŝanĝis opi-

niojn, kiuj ne ĉiam estis samaj, kaj tio estis komenco por la konstrua, iafoje instrua disputo. Tiam mi lernis respekton por alies pensoj, tiam mi komprenis, ke Esperantujo estas tapiŝo el multkoloraj fadenoj. Tio estis ankaŭ grava leciono de toleremo. Kaj tiu neforgebla teraso. Malsupre la urbo kun sia bruo, viglo, hasto, kaj ĉi tie kvazaŭ la tempo haltus. Kaj tiu silento, pikanta la orelojn. Nekredeble! Kafumadoj en la „verda” rondo kaj disputa fervoro, toranta, nebridebla. Jean-Jacques, Tazio, Marie-Lou, Perla, Giorgio, Gilles, Pascal, Kuniko, Wim, Els, Istvan, Tacuo, Blazio, Judita... Mi povus diri la nomojn senfine. Iuj bedaŭrinde jam forpasis... Sed en mia koro restis ĉiu vorto.

Mi ne forgesas la alian gravan taskon: esperantigon de franclingvaj verkoj de Privat. Ĝis nun mi aperigis broŝuron *Liberté doctrinale et sincérité* (Liberio doktrina kaj sincero) en traduko de Juanita Turbillon kaj en „privatiga” revizio lingva mia kaj de Claude Gaccond. Ĝi aperis en 1993. Poste sekvis la traduko de *Le Chancelier décapité* (La kanceliero senkapigita) fare de Thierry Flachon. Haveblas ankoraŭ du tradukoj de Thierry de *La Pologne sous la rafale* (Pollando sub ŝtormo) kaj *La Pologne attend* (Pollando atendas). Lastatempe mi kunlaboras kun Jean-Pierre Danvy, kiu jam esperantigis *Vision d'une jeune femme* (Vizio de juna virino) kaj nun tradukas *Aux Indes avec Gandhi* (Kun Gandhi en Hindujo). Komence de la venonta jaro HEJME kaj LIBRO-MONDO reeldonos por la tria fojo *Interpopolan konduton* kun antaŭparolo de Andy Künzli kaj *Vizion de juna viri-*

no. Espereble poste sekvos aliaj tradukoj el Privat.

Tie, en La Chaux-de-Fonds, mi partoprenis dufoje la interlingvistikajn kolokvojn en 1994 kaj en 1996. Mi kontribuis al ambaŭ aranĝoj per miaj prelegoj. Dum la dua kolokvo, kies kadrotemo estis „Esplorkampoj de Aplikita Interlingvistiko”, mi prezentis du prelegojn: „Samuel Bogumił Linde kaj lia provo krei interslavan Esperanton” kaj „La juda gramatiko de Zamenhof”. La tekstoj de tiuj prelegoj aperis libroforme en 1998, same okazis pri la materialoj de la unua kolokvo en 1994.

Krom viaj sciencaj esploroj, grandparton de via vivo ŝtelas la tradukado...

Efektive, tio ĉi estas grava parto de mia por-Esperanta laboro. Mi tradukas el la lingvoj: pola, germana, rusa, angla, itala, hispana, kroata kaj juda. Ĝis nun mi esperantigis plurajn verkojn. En 1988 PSEK eldonis la poemaron de Anna Świrszczyńska *Mi estas nur virino* en mia traduko. En 1989 kune kun Paweł Wimmer mi fondis „samizdatan” eldonejon LIBRO-MONDO, kiu aktivas ĝis hodiaŭ. Bedaŭrinde ne plu kunlaboras kun mi Paweł, kiu kunredaktas unu el la plej gravaj kompuilaj revuoj en Pollando. Mi do mem tradukas, multobligas, bindigas kaj dissendas ĉiujn produktaĵojn de mia eldonejeto, kiu devus ĝuste havi la nomon de multobligejeto. Ĉiujn titolojn oni povas trovi en la katalogo de la Libroservo de UEA. [Ĉi tie Tomasz listigas siajn tradukojn, pretajn por eldono, kiujn vi povas trovi fine de la teksto – red.]

De 1990 mi redaktas kaj aperigas kajerojn de soci-kultur-politika revuo *La Epoko*. Tiu ĉi revuo aperas neregule. Ekzistas la tuta eldonplano, kiu enhavas pli ol 300 kajerojn (po 20 ĝis 200 paĝoj). Mi multobligas ĉi tiujn kajerojn, kiam ili estas pretaj. Ĝis nun ekzistas trideko da kajeroj, haveblaj ĉe UEA, kaj pretaj por multobligo estas pliaj 70. Bedaŭrinde pro la financaj obstakloj, ili devas atendi sian vicon. Per *La Epoko* mi deziras alproksimigi la historiajn ŝanĝojn en Orienta Eŭropo por la tutmonda esperantistaro. Tre multe da loko mi dediĉas al literaturo, filozofio, naciliberiga batalo de la slavaj popoloj vivantaj en tiu ĉi parto de Eŭropo. Ĉefe mi plenigas la paĝojn de *La Epoko* laŭ jam menciita aŭtoro plano, sed ne mankas kontribuajtoj de la alilandaj samideanoj, se ili estas ligitaj kun la „Epoka” temaro. Ĉe LIBRO-MONDO aperis ankaŭ du studoj de Claude Gacond „Pri la penso de Hector Hodler” (1993) kaj „Ernest Naville – la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo” (1994). Al tio aldoniĝas la artikoloj de Hector Hodler (1993) „Novaj vojoj”, kiuj aperadis en la revuo Esperanto de 1915 ĝis 1917.

Tiu traduka pasio manifestiĝos en la plej nova ideo, prezentita unuafoje en Poznań...

Jes, dum la lasta ARKONES en Poznań formiĝis la redakta komitato de „Pola Antologio”. „Pola Antologio” konsistas el tri volumoj, per kiuj ni prezentos la plej gravajn verkojn el la pola literaturo de mezepoko ĝis la fino de la 20a jarcento. Kun surprizo ni

konstatis, ke ekzistas multe da tradukitaj poemoj kaj prozaĵoj. Unuflanke do estos necese kolekti la plej valorajn pecojn el tio, kio jam ekzistas, kaj aliflanke atendas nin formika esperantiga laboro pri novaĵoj. Mi kunmetis la enhavo-planon de la „Antologio”. Al la „Antologio” aldoniĝos la kolekto „Pola Biblioteko”, por kiu mi elektis 280 verkojn. Iom post iom mi esperas, ke ni efektiviĝos ambaŭ planojn.

Ne mankas al ni fervoro. En la redakta teamo Lidia Ligęza respondecas pri la poezia parto, mi pri la partoj proza kaj drama, kaj vi, Kazimierz, pri ĉiuj teknikaj aferoj – de kompostado ĝis eldono. Du fojojn ĉiujare la traduka kaj redakta teamo renkontiĝos dum 2-3 tagoj en Kazimierz ĉe Vistulo. La elekto de ĉi tiu loko ne estas hazarda. En Kazimierz okazis en 1907 la kongreso de junaj esperantistoj el la rusa parto de Pollando. La centjaran datrevenon de tiu kongreso ni volus omaĝi per la tria volumo de la „Antologio”, kiu entenos poezion kaj prozon de la polaj aŭtoroj, skribantaj en la jaroj 1939-2000. Kiel kunordiganto de la tradukaj laboroj pri „Pola Antologio”, mi invitas ĉiujn helpemulojn kontakti min rekte. Mia adreso poŝta: str. Jarzębinowa 3/30, PL 21-040 Świdnik, kaj la reta – tchmj@wp.pl.

Kiel influas vian laboron la pola Esperanto-movado? Ĉu ĝi estas favora al iniciatoj kaj homoj vere laboremaj, kiel vi?

Kun bedaŭro mi devas diri, ke la pola E-movado de longa tempo kolapsas. La pola historio ne ŝparis al ni elreviĝojn.

El la milito-stato, post la puĉo, ni eliris vunditaj kaj tiuj vundoj cikatriĝis malfacile. Preskaŭ unu generacio da esperantistoj elfalis el la movado kaj tiu breĉo ne estas tiel facile ŝtopebla. Mi restas ekster PEA de 1989. Tiam ne estis loko por multaj, kiuj forlasis la asocion proteste aŭ forpelite. Sed la aferoj de la pola esperantistaro ĉiam estis gravaj por mi. La tuta laboro, kiun mi faras por kaj per Esperanto – eble laŭ mia stulta imago – montras, ke ĉi tie restis ankoraŭ areto da lastaj mohikanoj, kiuj deziras fari ion, sen kalkuli pri profitoj, honoroj kaj distingoj. Ofte mia instruista poŝo ne eltenas, tiam mi devas iomete bremsi. Ĉiu forveturo al la Universala Kongreso signifas por mia familio pli modestan vivon almenaŭ dum kelkaj monatoj. Mi ne plendas. lamaj moŝtuloj el PEA, ĉiam vojaĝantaj je la kosto de la ŝtato, per neniu eminenta personeco, nek per eksterordinaraj kapabloj, sed per siaj intimaj ligoj kun la eksa reĝimo, transprenintaj la monopolon pri ĉio, kio okazis en la pola movado, certe ne komprenos la sindonemon, kun kiu por Esperanto laboras ekstermarĝenuloj. Sed tiu pozicio ekstermarĝene estas oportuna, permesas vidi ĉiujn fiagojn kaj aĉaĵojn pli akre. Mi tamen ĝojas, ke en Pollando ekzistas grupo de homoj, kun kiuj oni povas kunlabori, kun kiuj oni povas fari ion sencohavan. Tial mi alte taksas kunlaboron kun kelkaj homoj, bedaŭrinde sur du manoj kalkuleblaj...

Dum mia laboro pri la Privataj verkoj kun envio mi vidis perfekte konservitajn arĥivojn de Svisa Esperanto-Societo. Kaj samtempe mi pensis, ke niaj

arĥivoj putras en diversaj keloj, ke por neniu eblas esplori la historion de la pola movado. Tio estas skandalo. Ekzistas ja leĝoj pri konservado de arĥivoj. Tio estas devo de ĉiuj organizaĵoj. Tio jam ne estas neglektado kaj malzorgado de nia asocia heredaĵo. Tio jam estas afero por prokuroro. La asocio sen historio, sen propraj arĥivoj mortas. Ĝuste pri tiu morto oni povas nun paroli en Polujo. En la lando, kie naskiĝis Esperanto, la movado fartas treege malbone, ĝi kvazaŭ agonias. La procedo devus esti jena: interrompi la agonion kaj – se eble plej rapide – ŝanĝi la ĉeflegistojn, kies malagemo kaj senhelpeco estas danĝeriga kaj mortminaca por la elĉerpita paciento. Pli terurigas la fakto, ke la ĉeflegistoj havas nenian ideon, kiel elturniĝi el tiu malfacila situacio. La medicino progresis en ĉiuj landoj, kaj niaj ĉeflegistoj eĉ ne rimarkis, ke ŝanĝiĝis la tempo kaj kuracaj metodoj...

Kion „simplaj” esperantistoj povas do fari por ŝanĝi la bildon de pola E-movado – bildon de stagnado kaj atendado, ke eble „Deus ex machina” solvos niajn problemojn?

Stagnado estas realaĵo, kaj atendado helpas nenion. Ĉiu esperantisto estas ial kaj iel respondeca pri la Zamenhofa heredaĵo. Eble tro patose tio aŭdiĝos: ni estas soldatoj de Esperanto. Tamen nia batalo okazas ne kontraŭ homoj, sed kontraŭ falsa bildo, imago, kiun la ekstera mondo, ĉefe malamika, plejparte malfavora kaj entute indifera por nia agado, altrudas al ĉiuj. Per nia batalo ni volas atentigi, ke estas la nova

vojo, la alia maniero por fratigi la popolojn unu al la alia. Ni proponas egalecon en lingvokomunikado, ni donas liberan elekton, ni eldeigas nenion per la forto de mono, humiliĝo, obeemo, milito. Do, ĉiu esperantisto devus subteni tiujn klopodojn. Oni povas aboni revuon, aĉeti libron, aniĝi al Esperanto-asocio, elpensi novajn, pli interesajn agadformojn en loka Esperanto-klubo, partopreni almenaŭ unu fojon ĉiujare E-aranĝon. Per tia sinteno ni apogas la movadon. Per malgrandaj paŝoj ni alproksimiĝas al la grandaj celoj. Kiam mi partoprenas ARKONESon, mi tre ĝojas vidante tiom da polaj esperantistoj. Tio esperigas, kuraĝigas min por ĉio, kion mi faras. Plej bedaŭrinde estas, ke en tio mankas PEA – laŭ mi tio estas skandalo. Iam en la pola Esperantujo estis la tradicio de la tutlandaj kongresoj, kiuj ne nur diskonigis nian agadon en diversaj regionoj de la lando, sed ankaŭ estis forumo por interŝanĝi utilajn spertojn, opiniojn. Ankaŭ ili ne okazas, sed tio pruvas la malfortecon de la landa asocio.

Kiel dirite, mi ne estas membro de PEA. Iu povus ekpensi, ke mi saĝumas, ke mi kritikas nur por kritiki. Por diri la veron, en PEA ne estis loko por tiaj homoj kiel mi, kaj sufiĉe granda nombro da aliaj, kiuj ne volis obei ŝafe la moŝtulojn, kiuj volis disrompi tiun ensorĉitan cirkon de memkonteno, malpovo kaj malkapablo, kiuj volis paroli propravoĉe. Malfeliĉe tiu strebado malvenkis, ĉar iuj de interne kaj de ekstere helpis, ke ĝi malvenku. Nu, tio estas historio, kiu dolorigas ĝis nun. Tio koncernas la tuta movadon, ĉar el-

falis la tuta generacio da sindonemaj kaj fervoraj esperantistoj. Kaj tiu breĉo ne estas ŝtopebla ĝis nun.

Estas mirinde, ke tio, kio estas plej valora en la pola Esperantujo, okazas ĝuste ekster la kadro de PEA. Ĉu tio estas signo de la tempo, ĉu konfirmo de mia opinio, mi ne scias... Kun bedaŭro, kun malĝojoj mi povas konstati, ke la Estraro tradormas, travivas senzorge la sekvan kadencon... Ne gravas, ke PEA perdis ĉian prestiĝon en la monda Esperantujo, eĉ de la ŝtataj aŭtoritatoj kaj diversaj organizaĵoj enlande, gravas kelkaj seĝoj, kelkaj funkcioj, tiu minuto dum la malfermo de UK, kiam oni salutas nome de la polaj esperantistoj, kaj iel-tiel pasos semajnoj, monatoj, jaroj... Tio despli dolorigas, ke Polujo estas la lulilo de Esperanto, ke estas nia devo per formika laboro daŭrigi tion, kion per la spirita testamento lasis al ni Zamenhof...

Certe niaj legantoj reagos al tiu severa pritakso... Kaj kion vi opinias pri la loko de junularo en hodiaŭa E-movado en Pollando?

Nu, ŝanĝiĝas la tempo. La hodiaŭaj junuloj estas, Kazimierz, malsamaj kiel ni iam. Iliaj esperoj, atendadoj estas aliaj, ĉu pli bonaj mi ne povas respondi konvinke. Certe la nuna generacio da junaj esperantistoj estas generacio de la komputila epoko. Per tiu genia inventaĵo, kvazaŭ mirakle kreita por nia movado, ekestis dialogo tutmonda laŭ neimagebla skalo. Naskiĝis la virtuala dudekunjarcenta E-komunumo. Sen eliri el via hejmo vi povas lerni la lingvon, partopreni la plej gravajn

disputojn inter la verdsteluloj enlande kaj tutmonde, en la reto vi trovas ĉion, kion oni bezonas por kleriĝi pri la Esperantaj kulturo, literaturo, historio. Eĉ mi kunlaboras kun vi preskaŭ nur rete, kompostante librojn, farante korektolaboron. Ĝojige la E-junularo animigas tiujn manierojn de agado. Mi tamen vidas danĝeron. Ofte mi aŭdas, ke la junaj homoj tre bone uzas la lingvon, sed mi sentas, ke ili ne enradikiĝas en la movadon. Mankas al ili tiu kultura poluriteco, tiu kompreno pri interna ideo. Ne sufiĉas ellerni la lingvon, oni devas intimiĝi kun ĝia historio kaj literaturo. Mi pensas, ke ni venas al tre grava momento, nu, mi diru, al du tre gravaj momentoj. Estas necese ĉiel kvalitigi la movadon, kaj ne nur kvantigi ĝin. Nur el la kvalito kreskos la prestiĝo kaj agnosko. Kaj baldaŭ okazos la ŝanĝo de la generacioj en la movado, do, kiam venos la novuloj, plej ofte el inter la hodiaŭaj gejunuloj, ili do estu bone preparitaj, forte enradikiĝintaj en la movadon.

IJK en Zakopane montris, ke la junaj polaj esperantistoj estas tre lertaj organizantoj, ke ili kapablas pretigi la aranĝojn laŭ internacia, ba! eĉ interkontinenta skalo. Ili tamen ne falu en memkontenton, en rutinon. Kun granda intereso kaj admiro mi observas vigan agadon de „Varsovia Vento”. Kun ĝojo mi akceptas bonajn novaĵojn pri la agado de PEJ. Mi mem ĉiujare instruas Esperanton al kelkdeko da studentoj el la medioprotekta fako ĉe la Lublina Politekniko, kiuj elektas devige Esperanton kiel la duan lingvon krom la angla. Laŭ mi estus necese, eĉ nepre necese, aranĝi somerajn, du-tri semajnajn kur-

sojn, dum kiuj unuflanke oni progresigos la konon de Esperanto, kaj aliflanke sub la gvido de la konataj esperantistoj la gejunuloj povu malkovri la historion de la movado, la originalan Esperanto-literaturon, la unikajn valorojn de tia fenomeno, kia estas la Esperanta kulturo. Tio certe helpus kompreni la forton de nia movado. Tio garantius la pluan vivon al nia komunumo.

Mi estas trankvila pri la junaj polaj esperantistoj. Certe ili transprenos kaj portos la torĉon. Mi nur bedaŭras, ke mi jam ne estas samaĝa kiel ili.

Dankon por viaj sincera eldiro kaj profunda analizo. Ni esperu, ke niaj legantoj tralegos atente la tekston kaj almenaŭ pritaksos sian propran lokon en Esperantujo.

Tradukoj de Tomasz Chmielik

„La palaco” de Wiesław Myśliwski,
„Reguloj de vivo” kaj „Reĝo Maĉjo la 1a” de Janusz Korczak,

„La pupo” de Bolesław Prus,
„Leteroj de amo”, „La hispanaj okuloj” kaj „Postskribo” de Maria Nurowska,

„Esti pli rapida ol la Disinjoro”, „Hipnoto”, „Danco ĉe fremda nupto”, „Pruvoj de ekzisto”, „Tie estas neniu rivero” de Hanna Krall,

„La komenco” („La bela sinjorino Seidenman”), „La aŭtoportreto kun virino”, „Tago, nokto, tago” de Andrzej Szczypiorski,

„La imperiestro”, „La ŝafinŝafo”, „Ebono” (aperinta en la Nigra serio de KLEKS-eldonejo en 2001) de Ryszard

Kapuściński.

„La lada tambureto” de Günter Grass (kun Karin Lencki kaj Constant Borremans, aperinta en la Nigra serio de KLEKS-eldonejo en 2000),

„Rakontoj por infanoj” de Peter Bichsel,

„La nazio kaj la frizisto” de Edgar Hilsenrath,

„Estas skribite”, „La sozio”, „La blindulo”, „Romulo la Granda”, „La juĝisto kaj lia ekzekutisto”, „La suspekto”, „La proceso pri ombro de azeno”, „Nokta interparolo kun malamata homo”, „Stranitzky kaj la nacia heroo”, „Herkulo kaj la stalo de Aŭgio”, „La paneo”, „Greko serĉas grekinon”, „La vizito de la maljuna damo”, „La fizikistoj”, „Rebaptistoj” de Friedrich Dürrenmatt (kun Gerd Bussing),

„Gimpel, la stultulo”, „Spinoza el la strato Bazara”, „Mallonga vendredo”, „La seanco”, „La amiko de Kafka”, „La krono el plumoj”, „Pasioj”, „Malnova amo”, „La fantomo”, „La satano el Gorajo”, „La familio de Muškatoj”, „La mago el Lublino”, „La bieno”, „Heredaĵo”, „Meŝugo” (do ĉiuj romanoj kaj 215 rakontoj tradukitaj rekte el la jida) de Isaac Bashevis Singer,

30 rakontoj de Iĉĥok Lejbuŝ Perc.

„Kandeloj en vento”, „Kaprido por du groŝoj” de Grigorij Kanoviĉ.

„Fraŭlino Julia” kaj „Al Damasko” de August Strindberg.

„Atendante Godoton” de Samuel Beckett,

„La dormantaj belulinoj” de Yasunari Kawabata (kun Kikunobu MATUBA).



Urszula Zybura

Aforismoj

Por ke revo realiĝu, sufiĉas foje ĝin havi.

Singardu pli kontraŭ hipokrita ŝafisto ol kontraŭ fava ŝafo.

Dia principo: ne eblas, ke io neeblas.

Estu oazo de la faro en la dezerto de la vortoj.

Ĉu oni sopiras duone, se oni sopiras duope?

Ĉu mi vivas? – Mi simple ankoraŭ ne mortis.

Por egaj flugoj estas bezonataj egaj flugiloj.

Henryk Sienkiewicz

La Kruckavaliroj (fragmentoj el la ĉap. 29-30)

– Kies trupo estas? – subite demandis Jurand vekiginte malantaŭ Radzanów el pensoj kvazaŭ el dormo.

– La mia – respondis Zbiŝko.

– Kaj ĉiuj miaj homoj pereis?

– Mi vidis ilin mortaj en Niedzbórz.

– La malnovajn kunulojn mi jam ne havas!

Zbiŝko respondis nenion kaj ili plu rajdis silente, sed rapide, ĉar ili volis – se eble – plej baldaŭ veni al Spychowo, esperante ke tie ili trovos senditojn de la kruckavaliroj. Feliĉe por ili denove frostis kaj la vojoj estis trairitaj, do ili povis rapidi. Antaŭvespere Jurand reparolis kaj komencis demandi pri tiuj fratoj, kiuj estis en la arbara kastelo, kaj Zbiŝko rakontis al li ĉion – kaj pri iliaj plendoj, kaj pri la forveturo, kaj pri la morto de sinjoro de Fourcy, kaj pri la faro de sia armilportisto, kiu terure frakasis la ŝultron de Danveld, dum la rakonto li rememoris kaj surpriziĝis pri unu cirkonstanco, ke en la arbara kastelo estis tiu virino, kiu alportis de Danveld kuracajn balzamojn. Do, kiam ili haltis, li komencis demandi pri ŝi Ĉeĥon kaj Sanderuson – sed ambaŭ ne sciis precize, kio okazis pri ŝi. Al ili ŝajnis, ke ŝi forveturis aŭ kun tiuj, kiuj venis pro Danjo, aŭ tuj post ili. Tra la kapo de Zbiŝko flugis nun la penso, ke povus esti iu alia, sen-

dita por averti tiujn, se Jurand aperus en la kastelo. En tia okazo ili ne prezentus sin kiel homoj el Spychowo, sed ili povus kunporti novan skribaĵon, kiun ili donus al la princino anstataŭ la falsa letero de Jurand. Ĉio estis aranĝita kun diabla lerteco, kaj la juna kavaliro, kiu konis ĝis nun kruckavalirojn nur el batalkampoj, unuafoje ekpensis, ke ne sufiĉas nur pugnoj kontraŭ ili, sed bezonata estas ankaŭ la kapo por venki ilin. Ĉi tiu penso estis malagrable, ĉar la grandaj bedaŭro kaj doloro ŝanĝiĝis en li al la avido je batalo kaj sango. Eĉ la savo por Danjo montriĝis al li kiel aro da bataloj en trupo aŭ sole; dume li rekonis, ke eble la venĝemon kaj draŝadon sur kapaĉojn li devos bridi kiel urson per ĉeno kaj serĉi tute novajn manierojn por savi kaj liberigi Danjon. Pensante li bedaŭris, ke Maĉko ne estas kun li. Ĉar Maĉko estis same ruza kiel brava. Tamen li mem decidis sendi Sanderuson el Spychowo al Szczyttno, ke li trovu ĉi tiun virinon kaj klopodu ekscii de ĉi, kio okazis pri Danjo. Li diris al si, ke eĉ se Sanderus volus perfidi lin, nur iom li malutilos, kaj en mala okazo li povas fari grandajn servojn por li, ĉar lia okupo ebligis aliron al ĉiu loko.

Li tamen volis interkonsiliĝi antaŭe kun Jurand, do li prokrastis tion, ĝis kiam ili venos al Spychów, des pli ke

noktiĝis kaj ŝajnis al li, ke sidante sur la alta kavalira selo Jurand endormiĝis pro la peno, lacego kaj granda zorgo. Tamen Jurand rajdis kun mallevita kapo nur tial, ke la malfeliĉo klinis ĝin. Kaj oni vidis, ke senĉese li pensas pri ĝi, ke lia koro estas plena je kruelega timo, ĉar fine li diris:

– Prefere mi devus frostmorti apud Niedzbórz! Ĉu vi elfosis min el neĝo?

– Mi, kun aliaj.

– Kaj dum tiu ĉasado mian infanon vi savis!

– Ĉu mi povus ne savi?

– Kaj nun vi helpas min?

Kaj en Zbiŝko ekardis samtempe la amo al Danjo kaj tiel granda malamo al la kruckavaliroj–maljustuloj, ke li rektiĝis sur la selo kaj ekparolis tra la kunpremitaj dentoj, kvazaŭ pene:

– Aŭskultu, kion mi diras: eĉ se mi devus la prusajn kastelojn mordi per miaj dentoj, mi mordos, kaj ŝin mi liberigos.

Kaj sekvis momento de silento. Ŝajne la venĝema kaj senbrida naturo de Jurand ankaŭ manifestiĝis post la vortoj de Zbiŝko, ĉar li grincis per la dentoj en mallumo, kaj tuj poste li ripetis la nomojn:

– Danveld, Löwe, Rotgiero kaj Gotfrido!

Kaj en la animo li pensis, ke se ili petos liberigi de Bergovon, li ellasos lin, se ili ordonos al li pagi, li donos la monon, eĉ se la tutan Spsychów li devos aldoni al la prezo, sed poste estos ve al tiuj, kiuj levis manon kontraŭ lia unuso-filino!

Dum la tuta nokto la dormo eĉ ne fermetis iliajn okulojn. Antaŭ la mate-

no ili apenaŭ rekonis unu la alian, ĉar la vizaĝoj tiel ŝanĝiĝis dum la nokto. Fine Jurandon frapis tiu doloro kaj obstino de Zbiŝko, do li diris:

– Per la tuko ŝi kovris vian kapon kaj savis de la morto – mi scias. Kaj ĉu ankaŭ vi amas ŝin?

Zbiŝko kun la vizaĝo preskaŭ maltima rigardis al li rekte en la okulojn kaj respondis:

– Ŝi estas mia edzino.

Tiam Jurand haltigis la ĉevalon kaj rigardis Zbiŝkon palpebrumante de mi-rego.

– Kion vi diras? – li demandis.

– Mi diras, ke ŝi estas mia edzino, kaj mi – ŝia edzo.

La kavaliro el Spsychów kovris la okulojn per ganto, kvazaŭ li blindiĝus pro subita fulmo kaj respondis nenion, post momento li kurigis la ĉevalon kaj elŝoviĝinte antaŭ la trupon li rajdis en silento.

ĉapitro 30

Rajdante post li, Zbiŝko ne povis longe elteni kaj diris al si en la animo: „Mi preferus, ke li eksplodu kolere ol ke li ĉesu paroli.” Do, li alproksimiĝis al Jurand kaj frapinte per la piedingo ties piedingon li komencis paroli:

– Aŭskultu, kiel okazis. Kion Danjo faris por mi en Krakovo, vi scias, sed ne tion, ke en Bogdaniec oni svatis al mi Jagenkan, la filinon de Zych, el Zgorze-lice. Mia onklo, Maĉko, deziris; ŝia patro, Zych, deziris; kaj ankaŭ la parenca abato, riĉulo... Kial mi parolu longe? – la honesta kaj gracia knabino, ankaŭ la doton ŝi havas ricĉan. Sed ne povis

okazi tiel. Mi bedaŭris pro Jagenka, sed ankoraŭ pli grandan bedaŭron mi sentis pro Danjo – kaj mi iris en Mazovion, por viziti ŝin, ĉar sincere mi diros al vi: mi ne povis elteni pli longe. Rememoru, kiel vi mem amis – rememoru! – kaj vi ne miros.

Tiam Zbiŝko interrompis, atendante vorton el la buŝo de Jurand, sed kiam tiu silentis, li ekparolis:

– En la arbara kastelo Dio permesis, ke dum ĉasado la principon kaj Danjon mi savu kontraŭ uro. Kaj tuj poste la principino diris: „Nun Jurand cedos, li ja rekompencos tion vi!” Ankauŭ tiam sen via patra konsento mi ne volis edziĝi kun ŝi. Ba! mi tute ne povus, ĉar la furioza besto piedbategis min tiel, ke mi preskaŭ ellasis la animon. Sed poste – vi scias – alvenis tiuj homoj post Danjo, kvazaŭ por veturigi ŝin al Spychów, kaj mi ankoraŭ ne leviĝis de la lito. Mi pensis, ke neniam plu mi revidos ŝin. Mi pensis, ke vi forprenos ŝin al Spychów kaj edzinigos kun iu alia. En Krakovo vi ja estis kontraŭ mi... Mi jam pensis, ke mi mortos. Ho, potenca Dio, kia nokto estis! Nenio krom la turmento; nenio krom la bedaŭro! Mi pensis, ke kiam ŝi foriros, la suno ne leviĝos. Komprenu la homan amon kaj la homan doloron...

Kaj dum momento la voĉo de Zbiŝko ekremis plore, sed la koron li havis fortan, do li ekregis sin kaj diris:

– Tiuj homoj alvenis vespere kaj volis tuj kunpreni ŝin, sed la principino ordonis, ke ili atendu ĝis mateno. Kaj tiam Sinjoro Jesuo sendis al mi la penson, ke mi riverencu antaŭ la principino kaj petu ŝin pri Danjo. Mi pensis, ke se mi mor-

tos, almenaŭ tian konsolon mi havos. Memoru, ke la knabino devis forveturi, kaj mi kuŝis malsana kaj estis preskaŭ mortonta. Do, ne estis la tempo por akiri vian konsenton. La princo jam forveturis el la arbara kastelo, do la damo hezitis, ĉar ŝi povis interkonsiliĝi kun neni. Sed fine ŝi kaj pastro Wyszoniek kompatis min – kaj pastro Wyszoniek kunigis nin per la nupto... La Dia povo, la Dia leĝo...

Kaj Jurand interrompis al li obtuze:

– Kaj la Dia puno.

– Kial estu la puno? – demandis Zbiŝko. – Nur konsideru, ke tiuj venis je ŝi antaŭ la nupto kaj ĉu ĝi okazus aŭ ne, ili kunprenus ŝin.

Tamen Jurand denove respondis nenion kaj rajdis muta, malgaja kaj kun la vizaĝo tiel ŝtoniĝinta, ke Zbiŝko komence eksentis trankviligon, kiun ĉiam donas la konfeso de io kaŝata longe, sed poste li ektimis kaj parolis al si en la animo, pli kaj pli afliktite, ke la maljuna kavaliro silentiĝis pro kolerego kaj de nun ili estos unu por la alia kiel fremdaj kaj malamikaj homoj.

Kaj li eksentis grandan malĝojon. Neniam, de tiu momento, kiam li forveturis el Bogdaniec, li fartis tiel malbone. Nun ŝajnis al li, ke estas nenio espero por favoriĝi Jurandon, nek por savi Danjon, ke ĉio fariĝos vana kaj baldaŭ falos sur lin nur pli kaj pli dolorigaj zorgoj, pli kaj pli granda malfeliĉo. Sed tiu malĝojo ne daŭris longe, kaj ĝuste laŭ lia naturo tio ŝanĝiĝis poste en koleregon, en la deziron kvereli kaj batali. „Li ne volas konkordon – li diris al si pensante pri Jurand – estu la malkonkordo, estu tio, kion li volas!” Kaj li estis

preta salti kontraŭ Jurand. Ekregis lin ankaŭ la emo interbatiĝi kun iu ajn kaj pri io ajn, nur por fari ion, nur por ellasi malĝojon, amaron kaj furiozon, por liberiĝi de ĉiuj zorgoj.

Kaj dume ili venis al la gastejo ĉe la disvojaj, nomata Svetliko, kie Jurand – revenante de la princa kortego al Spychów – kutime ripozigis siajn kunulojn kaj ĉevalojn. Malgraŭvole li faris tion ankaŭ nun. Post momento li kaj Zbiŝko troviĝis en la aparta ĉambro. Subite Jurand haltis antaŭ la juna kavaliro kaj – alkroĉinte al li sian rigardon – demandis:

– Vi migris ĉi tien por ŝi?

Kaj li respondis preskaŭ krude:

– Ĉu vi pensas, ke mi malkonfesos tion?

Kaj li komencis rigardi en la okulojn de Jurand, preta reciproki la koleron per kolero. Sur la vizaĝo de la maljuna kavaliro ne aperis obstino, sed nur malĝojo preskaŭ senlima.

– Kaj mian infanon vi savis? – li demandis post momento. – Ankaŭ min vi elfosis el neĝo?...

Zbiŝko rigardis lin mirigite kaj timante, ĉu li ne freneziĝos, ĉar Jurand ripetis la samajn demandojn, kiujn li faris jam pli frue.

– Sidiĝu – li diris – ĉar mi vidas, ke vi estas ankoraŭ malforta.

Tamen Jurand levis ambaŭ manojn, metis ilin sur la ŝultrojn de Zbiŝko – kaj subite alpremis lin forte al sia brusto; kaj li – trankviliĝinte post subita mirego – ĉirkaŭprenis Jurandon kaj longe ili staris tiel, ĉar ambaŭ estis kunigitaj per la komunaj zorgoj kaj komuna malĝojo.

Kiam li ellasis Zbiŝkon el la brakoj,

li ĉirkaŭprenis la genuojn de la maljuna kavaliro, kaj poste kun larmoj en la okuloj li kisis Jurandon sur la manon.

– Ĉu vi ne estos kontraŭ mi? – li demandis.

Kaj Jurand diris responde:

– Mi estis kontraŭ vi, ĉar en la animo mi oferis ŝin al Dio.

– Vi oferis ŝin al Dio, kaj Dio – al mi. Estu Lia volo!

– Estu Lia volo! – ripetis Jurand – sed ni bezonas nun ankaŭ kompaton.

– Kiun helpos Dio, se ne la patron, kiu serĉas la infanon, se ne la edzon, kiu serĉas la edzinon? La rabistojn Li ne helpos.

– Ili ja forkaptis ŝin – respondis Jurand.

– Do, vi redonos al ili de Bergovon.

– Mi redonos ĉion, kion ili volos.

Tamen la penso pri la kruckavaliroj baldaŭ vekis en li kiel ĉiam la malmamon, kaj ĝi ekregis lin kiel ardo, ĉar post momento li diris tra la kunpremitaj dentoj:

– Kaj mi aldonos, kion ili ne volas.

– Mi ankaŭ ĵuris venĝon kontraŭ ili – respondis Zbiŝko – sed ni devas nun iri al Spychów.

Kaj li komencis urĝigi, ke oni remetu la selojn sur la ĉevalojn. Do, kiam ili satigis sin per furaĝo, kaj la homoj iom varmigis sin en la ĉambroj, oni ekiris, malgraŭ ke jam krepuskiĝis. Ĉar la vojo estis ankoraŭ longa, kaj dum la nokto frostegos, Jurand kaj Zbiŝko, kiuj ne refortiĝis, veturis per sledo. Zbiŝko rakontis pri onklo Maĉko, je kiu li sopiris en la animo, kaj li bedaŭris, ke nun li ne sidas kun ili, ĉar utilaj povus esti lia braveco, kaj ankaŭ la ruzeco, kiun ili bez-

Historia manuskripto de Zamenhof

Preskaŭ tuj post la aperigo de „Historio de Esperanto” mi ekricevis reagojn, i.a. tre valorajn de Nora Caragea kaj Reinhard Haupenthal, kiujn mi utiligos ĉe pretigo de la dua eldono.

Sed la 3an de oktobro 2005 Norman Divall en la diskutlisto pri la historio de Esperanto petis la tekston de unu el la lastaj artikoloj de Zamenhof, al kiuj mi referencis. Ĉar du tagojn poste ankaŭ Christian Lavarenne interesiĝis pri ĝi, mi decidis publikigi la tekston en nia retejo. Ĉi tiu artikolo unuafoje aperis posteume en la revuo „Esperanto” (1971. №12), kiun tiutempe redaktis V. Sadler.

Estas konate, ke Zamenhof plurfoje proponis reformi la lingvon, kaj kelkaj liaj reform-proponoj estis ripetataj preskaŭ ĉiufoje. En la suba teksto li supozeble aludas denove pri ili. Oni facile trovas la Zamenhofajn reform-proponojn en liaj presitaj verkoj kaj... en dekoj da reformprojektoj de Esperanto, kiuj, kun efemera escepto de *Ido*, restis nuraj lingvaj kuriozaĵoj neniam aplikitaj en uzado.



↪ onos pli multe ol la bravecon kontraŭ tiaj malamikoj. Fine li turniĝis al Jurand kaj demandis:

– Ĉu vi estas ruza?... Ĉar mi – tute ne kapblas.

– Ankaŭ mi – respondis Jurand. – Ne per la ruzeco mi batalis kontraŭ ili, sed per tiu mano kaj per la doloro, kiu restis en mi.

– Mi komprenas – diris la juna kavaliro. – Mi komprenas tial, ke Danjon mi amas kaj ke ili forkaptis ŝin. Se, Dio gardu...

Kaj li ne finis, ĉar pro tiu penso li ek-sentis en la brusto ne la homan, sed lupan koron. Dum kelka tempo ili veturis silente sur la blanka vojo, kiun surverŝis la luna brilo, poste Jurand ek-parolis kvazaŭ al si:

– Ke ili havas kaŭzon por venĝi sin kontraŭ mi – mi estas certa diras! Tamen – je Dio! – ili ne havis... Mi batalis kun ili sur la kampo, kiam mi rajdis kiel sendito de nia princo al Vitoldo, sed ĉi tie mi estis kiel najbaro por la najbaroj... Bartoŝ Naŭęcz – kvardek kavalirojn, kiuj iris kontraŭ li – kaptis, enkaŭtenigis kaj enfermis subtere en Koźmin. Duonĉaron da mono por tiuj devis ŝuti la kruckavaliroj. Kaj mi, se venis germano, kiu migris al la kruckavaliroj, ankoraŭ gastigis lin kiel kavaliro kavaliron kaj pridonacis malavare. Kelkfoje ankaŭ la kruckavaliroj venis al mi tra marĉo. Tiam mi ne estis kruela, sed ili faris tion, kion mi ne farus hodiaŭ al la plej granda malamiko...

tradukis Tomasz Chmielik

HISTORIA MANUSKRIPTO DE ZAMENHOF

Kiam mortis d-ro Zamenhof en 1917, sur lia skribotablo postrestis kelkaj nefinitaj manuskriptoj. La vidvino donis ilin al prof. Privat, kaj tiu en 1962 donacis unu el ili al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW). Dank' al la deĉifra laboro de s-ro A. Holzhaus (Usono) kaj la kunlaboro de IEMW, ni povas nun publikigi grandan parton de tiu manuskripto, verkita, kiel el ĝia teksto evidentiĝas, en 1915. Sendube sub la influo de la Ido-skismo kaj la multaj aliaj reformprojektoj en la frua historio de la lingvo, Zamenhof antaŭvidis „porĉiaman revizion de Esperanto”, tamen sub la kondiĉo, ke ĉiu ŝanĝo rilatu ne al „punkto disputebla” sed al „maloportunaĵo senduba”, kaj ke decidan voĉon havu la Lingva Komitato.

Hodiaŭ, pli ol duonjarcenton poste, la vivo jam postlasis tiajn ideojn. En lingvo enradikiĝinta eĉ kiel familia lingvo oni ne venas al ideo fari „reviziojn”. Tamen, malgraŭ sia malaktualeco, la manuskripto havas, kiel ĉiuj vortoj de Zamenhof, grandan historian kaj stile-lingvan intereson.

Ĉi tiu mia artikolo, pro sia unuamomenta impreso, facile povos esti malĝuste komprenata kaj ŝajnigi, kvazaŭ mi intencas elpaŝi kun ia reformado de nia lingvo. Tial mi antaŭ ĉio insiste petas la legantojn, ke ili juĝu ne laŭ la unua impreso, sed laŭ la esenco, kiun ili estas petataj bone

pripensi kaj klarigi al si.

Mi atentigas tuj en la komenco, ke mia opinio pri la evoluo de nia lingvo neniom ŝanĝiĝis, sed restis absolute tute sama, kia ĝi estis de la Bulojnja Kongreso ĝis nun. Mi intencas fari absolute nenian atencon kontraŭ la „Fundamento de Esperanto”, sed mi volas nur proponi provon de praktika apliko de tiuj ideoj, kiuj estas teorie elmontritaj en la Antaŭparolo al la „Fundamento”, kaj kies apliko pro diversaj cirkonstancoj dum longa tempo estis ne farebla.

La demando pri „perfektigoj”

De la unua momento de la apero de Esperanto nian movadon konstante akompanis teda ombro, kiu jam kaŭzis al mi tre multe da malagrablaĵoj kaj malhelpoj: tio estas la demando pri „perfektigoj”. De tempo al tempo tiu demando elŝoviĝas akre kaj eĉ minace, poste ĉio trankviliĝas, sed eĉ la ŝajne plej granda trankvileco ne donas al ni garantion, ke baldaŭ la malfeliĉa demando ne eksplodos denove, eble tute neatendite, aŭ ne komencos sian kaŝitan mordetadon.

Pro la stato de milito, kiu regis en nia afero, mi dum la lastaj jaroj nenion parolis pri la demando de perfektigoj; ĉar en tempo de maltrankvileco la unua ordono estas: stari forte. Sed nun, kiam dank' al la fideleco de la tuta esperantistaro la tumulto pli aŭ malpli pasis, kiam ni ne bezonas plu timi, ke trankvila teoria analizado vekos diversajn „apetitojn”, kiam la sento de disciplino tiel forte penetris en la konscion de ĉiuj

esperantistoj, ke ni ne bezonas plu timi diversajn ribelojn, nun ni povas trankvile paroli.

En tia afero, kiel nia, la ekzistado de la demando pri plibonigoj estis per si mem tute natura kaj neevitebla. Estas vero, ke en la nuna tempo la grandega plimulto de esperantistoj konscias, ke ni devas labori ne por la akirado de ia (cetere tute neatingebla) „absoluta perfekteco” de la lingvo internacia, sed por la plena fortikiĝo de la ekzistado de nia lingvo; ke ni povas atingi nian celon nur per severa konstanteco, sed ĉiu (eĉ plej malgranda) ŝanĝo en la lingvo ruinigos nian tutan aferon; ke se ni komencos fari eĉ plej malgrandajn ŝanĝojn, ni neniam povos halti; ke nia lingvo vivos nur tiam, kiam ni respektos ĝin kiel lingvon vivantan kaj ne permesos al ni iajn eksperimentojn tiel same, kiel ni tion ne permesas al ni kun ĉiu alia vivanta lingvo. Tamen ne ĉiu (esperantisto) mondolingvisto estas absoluta konservemulo.

Pacienco kaj konstanteco

Ni ne parolas pri tiuj, kiuj rigardas novan lingvon kiel nur naskiĝantan, kiuj senorde kaj sendiscipline penas ĝin ŝanĝi ĉiu laŭ siaj ideoj; en tia senfina reciproka kritikado kaj „plibonigado”, kiu jam delonge estus pereiginta la tutan mondolingvan ideon, se ni ĝin ne gardus per nia pacienco kaj konstanteco, ili ekstermos sin mem, kaj ni trankvile iros nian vojon ĝis ni plene atingos nian celon. Sed eĉ inter la plej fervoraj respektantoj de la vivo kaj rajtoj de nia lingvo troviĝas

personoj, kiuj, eble ne tute senprave, diras jenon:

„Ni plene konscias, ke en lingvaj aferoj la ĉefaĵo kaj la conditio sine qua non estas plena unuformeco kaj konstanteco; ni plene konscias, ke ĉia eksperimentado sur vivanta organismo estas danĝera por ĝia vivo, kaj ke ni devas uzi Esperanton tian, kia ĝi estas, aŭ tute ĝin ne uzi”.

Praktika elprovado

Sed ĉiu vivanta organismo havas partojn, kies blinda netuŝado estus tute malprava kaj donus al ni nur sencelajn maloportunaĵojn (ekzemple se ni timus tranĉi niajn harojn aŭ ungojn, por ne fari ian „kontraŭnaturajon”). Ni uzas nun Esperanton en tiu formo, kiun donis al ĝi ĝia aŭtoro post longa laborado en kabineto antaŭ ol ĝin sufiĉe elprovis larĝa vivo praktika.

Depost la momento de ĝia apero Esperanton ĉiuflanke elprovis la vivo; tre multaj miloj da homoj dum multe da jaroj kaj en la plej diversaj statoj uzis ĝin kaj elprovis ĝin praktike; la lingvo montriĝis tute vivipova, tamen dum la multejara kaj multehoma praktika elprovado certe ne povis ne montriĝi, ke ekzistas en la lingvo tiu aŭ alia maloportuna bagatelo, kies maloportunecon la kreinto de la lingvo ne povis bone rimarki en sia kabineto, sed kiu poste en la praktika vivo montriĝis kiel io tre ĝenanta kaj samtempe tre facile forigebla; kial do ni ne forigu tion? Kial ni tute sencele devigu ĉiujn estontajn uzantojn de la lingvo eterne treni kun si la ĝenanatan maloportunaĵon (kiu restis en la lin-

gvo simple nur pro nerimarkiteco kaj) kiu povas facile esti forigita absolute sen ia danĝero aŭ maloportuneco por la lingvo?

Ĉu ni devas timi, ke se ni hodiaŭ forigos iun punkton, morgaŭ montriĝos aliaj forigindaj punktoj kaj ni devos senĉese rekonstrui la lingvon? Ne, absolute ne!

Ĉar ni parolas ja ne pri punktoj disputeblaj (kiujn tuŝi ni ne devas), sed nur pri maloportunaĵoj sendubaj, kiuj restis en la lingvo sole nur pro manko de sufiĉa praktika elprovo. Sed kio restis kaŝita por unu homo en la daŭro de kelke da jaroj kaj ĉe laborado unuflanka, ne povis ja resti kaŝita al dekmiloj kaj centmiloj da homoj en la daŭro de 28 jaroj kaj ĉe elprovado ĉiuflanka. Ekzistas sekve neniam eĉ plej malgranda dubo, ke maloportunaĵoj, kiuj ne estas trovitaj en la lingvo ĝis nun, estos trovitaj en ĝi neniam. Ni sekve povas esti tute certaj, ke se ni nun per plej vasta enketo kaj unuanima interkonsento revizios la tutan lingvon kaj forigos el ĝi ĉion, kio post multejara, multehoma kaj ĉiuflanka elprovado montriĝis kiel sendube maloportuna kaj samtempe facile forigebla, ni poste jam neniam devos ripeti la saman laboron. La lingvo tiam ricevos sian tute definitivan, oportunan kaj nedisputeblan formon por ĉiam; kaj tiam por ĉiuj homoj, kiuj efektive respektas la vivon kaj rajtojn de nia lingvo, la malfeliĉa demando pri plibonigoj, kiu kaŝite mordetas la koron eĉ de la plej fidelaj esperantistoj, malaperos por ĉiam.

Tiam malaperos por ĉiam la gla-

vo de Damoklo, kiu konstante pendas super nia lingvo, kiel ajn ni kovris antaŭ tio niajn okulojn, tiam la lernanto havos plenan certecon, ke li neniam devos ion relerni; tiam ĉiu verkisto havos plenan certecon, ke liaj verkoj neniam fariĝos senvaloraj. Ni deziras do, ke oni unu fojon por ĉiam faru detalan revizion de nia tuta lingvo, kaj — tuŝante nenion, kio estas disputebla, oni forigu el la lingvo por ĉiam ĉion, kio montriĝis kiel sendube maloportuna kaj sendanĝere forigebla.

Tiel parolas (aŭ almenaŭ kaŝite pensas en sia interno) multaj tre fervoraj kaj fidelaj esperantistoj. Ĉia malpermesado aŭ terorisma sufokado de tiuj vortoj aŭ pensoj kondukas al nenio. „Kial ni konservu en nia lingvo tiujn kelkajn bagatelojn, kiuj estas simple frukto de teoria nerimarkeco, kiuj ĉiujn nin konstante ĝenas kaj tamen povas esti tre facile forigataj?” Ĉi tiun tute naturan demandon, kiu nin konstante tedados, ni devas ne perforte kaj senrezulte sufokadi, sed ni devas doni al ĝi ian solvon, ĝis ni fine donos al ĝi ian solvon. [Tiel en la manuskripto. — red.]

La fama fabla urso

Agante propravole, ni povas doni al tiu demando solvon tre facile, en tempo kaj maniero plej oportunaj; sed se ni perforte nur sufokados tiun naturan demandon, ĝi pli aŭ malpli frue eksplodos kontraŭ nia volo (kiel ĝi faris jam kelkfoje) en tempo kaj maniero tre maloportunaj kaj eble tre danĝeraj por nia afero. Se ni,

esperantistoj, la solaj kompetentuloj en la aferoj de nia lingvo, ne solvos tiun demandon konforme al nia sperto kaj al nia profunda amo al la afero, tiam povos okazi, ke iam la registaroj, decidinte akcepti nian lingvon, transdonos ĝian korektadon al personoj, kiuj havos famajn nomojn, sed absolutan senspertecon en nia afero, kaj ĉi tiuj agos simile al la fama fabla urso, kiu, intencante mortigi muŝon sur la frunto de sia gvidanto, frakasos lian kapon.

Ni devas do trovi solvon por malfeliĉa demando, kiu konstante pendos super nia lingvo kiel la glavo de Damoklo. Ni devas (unu fojon por ĉiam) tre atente kaj detale revizii nian tutan lingvon...* La revizio devas esti farata en maniero plej lojala; decidan voĉon devas havi nur nia Lingva Komitato** kaj nur tion, kion la Lingva Komitato akceptos, ni ĉiuj devas rigardi kiel akcepteblan. Kiel ajn!

Notoj de V. Sadler

* Zamenhof ne finis poluri la frazon kaj en la originalo troviĝas notetoj „Ne timu! Mi ne volas proponi al vi ian lingvan revolucion, kiu en aliaj aferoj eble povus utili, sed en afero de lingvo internacia estas absolute nepermesbla”. (red.)

** Lingva Komitato fondiĝis dum la 1a UK en 1905; ĝia membraro konsistis el 102 personoj el 28 nacioj. Iom post iom ĝi metamorfozis sin en la nunan Akademion de Esperanto. (red.)

Esperanto. 1971. №12 (792), paĝoj 202–203. Pretigis por la reta eldono

Aleksander Korĵenkov

Kara sinjoro,

mi tre ĝojis pri la lasta numero de la „Pola Esperantisto”, pro diversaj kaŭzoj.

Unue — la redaktora enkonduko sonis eĉ pli pozitiva kaj stimulanta ol kutime.

Due — la kajero ne nur enhavis dignajn omaĝojn al la mortinta Papo Johano Paŭlo la Dua, sed ankaŭ la simpatian leteron de Josef Šemer, Prezidanto de Esperanto–Ligo en Israelo.

Trie — la viva raporto pri la jubileo (100-jara datreveno) de la unua E-kongreso en Bulonjo tre plaĉis al mi.

Kvare — interesigis min aliaj raporto kaj leteroj, ankaŭ la artikolo pri „Eŭrolingvo” (kaj la globala Babel-turo) farita de pola farmaciisto el Gdansko.

Kvine — inter la plejbelaĵoj de la kajero estis la artikolo pri Lidia Zamenhof, la filino de L.L. Zamenhof.

Lidia Zamenhof (1904–1942) estis entuziasma reprezentantino de Esperanto, mortigita kiel juda viktimo en koncentrejo. La artikolo ankaŭ mencias, ke Lidia aliĝis al la Bahaa Kredo. Bahá'u'lláh (1817–1892), la Fondinto de la Bahaa Kredo, antaŭdiris ke baldaŭ estos establita la daŭra paco sur la tero. Li postulis ke unu de la nepre necesaj iloj — nur unu, sed grava ilo — por establi la pacon sur la tero estos la elekto (kreo) de unu deviga mondlingvo, kiun devas lerni ĉiuj infanoj de la mondo krome de sia gepatra lingvo. Kial ĉi tiu estonta lingvo ne estu Esperanto? Esperanto havas tutajn necesajn kvalitojn. Tial la Bahaanoj ekde la komenco forte kaj amike subtenis kaj subtenas la E-lingvon en la tuta mondo. Ekzemple, en la nuna E-Kongreso en Litovio, kaj ankaŭ en la Junulara Kongreso en Zakopane, partoprenis Bahaanoj. Videblas sufiĉe da signoj, ke Esperanto kreskas enen la rolon de internacia helplingvo — mankas en ĉi tiu momento nur la pli vasta konscio de la nova evoluo inter la mondaj popoloj.

Korajn salutojn

Klaus Krieger
klauskrieger@poczta.onet.pl

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio „SUB”

La prepozicio **sub** propre signifas, ke iu aŭ io troviĝas pli malalte ol la nivelo aŭ ol la supro de io (**sub**: akvo, tero, maro, ĉielo, arbo, ponto, tablo, ĉapelo, tegmento ktp.)

Estas sciate, ke malo de **super** estus **malsuper**, sed pro ties maloportuna longeco oni uzas anstataŭe **sub**. **Ĝenerale dirite, tiu ĉi prepozicio estas esprimanta:**

1. Pozicion de unu objekto rilate al alia objekto, troviĝanta pli alte kaj tuŝanta ĝin:

a) sen translokiĝo:

Sub neĝotavolo ripozas vintraj ĝardenaj plantoj. Dum vintraj ŝtormoj multaj plaĝoj troviĝas **sub** akvo. Ŝi dormas ĉiam kun la saniga kuseno **sub** la kapo. Li venis al mi kun dika aktarujo **sub** la brako. **Sub** maldika tertavolo etendiĝis torfejo.

b) kun translokiĝo:

Pro malatento li falis **sub** la radojn de aŭto. Nia avo metas ofte litvarmigon **sub** la dorson. La cikonio levis **sub** sin unu piedon. Ŝi metis la foton **sub** mian fotoalbumon.

2. La pozicion de unu objekto rilate al alia objekto, troviĝanta pli alte, sed ne tuŝanta ĝin:

a) sen translokiĝo:

Ni veladis tra Jamno-lago **sub** granda velo de nia konkurboato. **Sub** lia gastama tegmento tre ofte

kolektiĝas geamikoj. La muso malpacience kuradis **sub** nia kanapo. Tradiciaj donacoj **sub** kristnaska arbeto ĝojigas ĉiam la korojn.

b) kun translokiĝo:

El **sub** la sofo la muso kuris **sub** la ŝrankon (al alia loko, troviĝanta **sub** la ŝranko).

Kelkaj kolomboj flugis de sur la tegmento **sub** la arbon. Li subite kuris **sub** la ponton.

3. La eksteran ŝajnon: Ludoviko Zamenhof eldonis sian projekton de la lingvo internacia **sub** la pseŭdonomo Doktoro Esperanto. **Sub** la nomo de pomvino oni donis al ni simplan akvon. Ŝi aperis sur la scenejo **sub** la formo de maljunulino.

4. La dependecon: La nova registaro tenos la popolon **sub** sia regado. Maristoj de trejna ŝipo ne plu volas servi **sub** ordonoj de sia kapitano. Li estis stiranta la aŭton **sub** la influo de narkotaĵoj. **Sub** la kondiĉo de al-pago, oni konsentis sendi al mi du librojn. Dum ĈEP-aranĝoj en Mielno ĉiuj dancas **sub** (laŭ) plaĉa danĉmuziko.

Karaj **gesamideanoj**, **sub** verdaj flagoj ni iru antaŭen por atingi nian celon en gloro.

La prepozicio **sub funkcias ankaŭ kiel prefiksoido:**

• **subporti** = porti (de) sube, ekz.

Stabloj **subportas** la scenejon.

- **subskribi** = skribi ion sub io;

subdiri = flustre aŭ alude diri = **subflustri**,

- **subaŭskulti** = kaŝe aŭskulti;

subridi = kaŝe ridi (Li **subridis** ŝian naivecon.)

- **subrigardi** = ruze, hipokrite rigardi, ekz. **Subrigardas** malvirtulo virtulon.

- **submeti** (Li submetis sian proponon al konsidero de ĉeestantoj.)

- **subaĉeti** = delogi per mondonaco kaŝita, ekz. Li **subaĉetis** la ĉambrestinon, ke ŝi lasu la pardonon neŝlosita. **subteni** = teni (de) sube (**apogi**),

- **subiĝi** = fariĝi suba, ekz. La suno jam komencis **subiĝi**.

- **subpremi** = premi sub sia potenco, ekz. Li **subpremis** ribelon.

- **subfosi** = fosi sube de io, ekz. Kiu provas **subfosi** la signifon de Esperanto, tiu ne konas la ideon de la lingvo internacia.

- **subakvigi**, **subverŝi**, **subkudri**, **subglui**, **substreki**, **subforĝi**, **subpingli**,

- **subtera** (trapasejo, fervojo, ĉambro, kaverno, galerio, naftodukto)

- **subakva** (ŝipo, torpedo, tunelo, konduktubaro)

- **submonta**, **subpieda**, **subtegmenta** (ĉambro, mansardo, ripozejo),

- **subkonstruaĵo** (fundamento de konstruaĵo), **subfosaaĵo**, **submetaĵo**, **subteraĵo**,

- **suboficiro**, **subleŭtenanto**, **subkolonelo**, **subministro** (= vicmini-

stro),

- **subordino**, **subvesto**, **subjupo**, **subpantalono**, **subĉemizo**, **subŝtofo**,

- **subulo** = homo dependanta de aliaj homoj

- **sube** = en suba loko; **suben** = en la suban lokon

Rimarko: La vortoj **subteni** kaj **sublevi** havas ankaŭ sence metaforan (**helpi**).

Ekz. Ŝi akceptis monan **subtenon** de sia bopatro. Li **sublevis** ŝin en finance kriza situacio.

Kiel kutime mi aldonas kelkajn proverbojn el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:

- Akvo silenta subfosas la bordon.
- Al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas.

- Ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu.

- Li trafis el sub pluvo en riveron.
- Esti sub ŝuo de sia edzino.

- Sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro.

- Sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu.

- Donacetoj subtenas amikecon.

Reabonu por la Nova Jaro!

Denove en tiu ĉi numero de PE ni enmetas pagilon por reabono de la revuo. Multaj el vi jam pagis por la venonta jaro. Aliajn pagojn ni atendas – se eble – ankoraŭ en ĉi tiu jaro.

Ni dankas al ĉiuj ĝisnunaj helpantoj kaj bonvenas la novajn!

Ĉiu esperantisto...

Ĉiu Esperantisto konas la dek-sesan regulon, kiu permesas forlasi la finan vokalon de substantivo kaj de la artikolo kaj anstataŭigi ĝin per apostrofo.

Neniu regulo permesas tion por la adverba „-e”.

Tamen ekzistas sennombraj Esperantistoj, kiuj senĝene diras kaj skribas „dank’ al”.

Se oni tion tolerus, oni devus toleri ankaŭ „help’ de, per’ de, rekt’ de, cel’ de, direkt’ al, escept’ de, flank’ de, kondiĉ’ ke, kun’ kun, laŭlong’ de, mal’ ke, mank’ de, renkont’ al, spit’ de, supoz’ ke, tut’ ne” kaj sennombrajn aliajn analogiajn formojn.

Kun tiu „dank’ al” Esperanto ĉesas esti lingvo bazita sur senescepta regularo.

Oni ne diru, ke en „dank’ al” la apostrofo anstataŭas elizitan substantivan „-o”.

Neniu Esperantisto dirus: „mi atingis tiun celon danko al mia penado”, sed ĉiu aprobus: „mi atingis tiun celon **danke** al mia penado”.

Ĉiu Esperantisto ankaŭ konas la lastan frazon de la sesa regulo, kiu klare diras, ke la „prepozicio ĉe la pasivo estas **DE**”.

Tamen iu „pliboniganto de Esperanto” — mi metas la vortojn inter citiloj — kuraĝe inventis la prepozicion *far*, kaj multaj Esperantistoj komencantoj, post la unua ŝoko, kon-

tentaj, ke ili estas lernintaj ion novan, uzadas ĝin. Ili vere ne scias, kion ili faras.

Same kiel „dank’ al” ankaŭ tiu *far* estas danĝera paŝo al la ĥaosigo de la lingvo.

Kio okazos?

Se la maĵorio de la Esperantistoj intue sentas la minacantan danĝeron kaj rezistos al tiu *far*, tiam ĝi estos baldaŭ forgesita kaj malaperos el la lingvo.

Aliakeze ekestos skismo. Iuj ekuzos la novan prepozicion, aliaj evitos ĝin. Tio estos plua paŝo al la ĥaosigo de la lingvo.

Krome estas notinde, ke ekzistas en ĉiu lingvo certa tendenco diferencigi la signifojn de sinonimaj esprimoj. La gramatikistoj do baldaŭ vidos sin devigataj esplori kaj difini la diferencon uzon de „de” kaj de „far”. La sekvo estos nova regulo kaj plikomplikiĝo de la lingvo.

Esperanto ja estas vivanta lingvo. Sed pro tio ĝi ne ĉesas esti arte farita. Ĝi estas esence alia lingvo ol la etnaj lingvoj.

Kiel taŭga interkomprenilo laŭ mondvesta skalo ĝi devas esti ĉiam denove reguligata laŭ la Fundamenta gramatiko kaj logiko, por ke ĝi gardu sian senesceptecon kaj raciecon, kiuj ambaŭ kondiĉas ĝian belecon kaj kiuj estas necesaj por propagandi ĝin.

Rikardo Ŝulco „Sur la vojoj de la Analiza Skolo”

Preparis Danuta Kowalska

El la Movado...

Novaj honoraj membroj de UEA el Pollando

Dum la lasta UK en Vilno inter ok novaj „Honoraj membroj de UEA” estis elektitaj du poloj.

Unu el ili Roman Dobrzyński konata ĵurnalisto kaj reĝisoro de multaj filmoj pri Esperanto kaj en Esperanto. S-ro Dobrzyński estas tre konata en esperantista mondo pro sia konstanta agado. Li estis prezidanto de PEA kaj vicprezidanto de UEA. Polaj esperantistoj konas lin pro la multaj interesaj prelegoj kaj prezentadoj de siaj filmoj. Li konstante kaj daŭre agadas ne nur en pola „Esperantujo”. Forte subtenas junajn esperantistojn.

Andrzej Pettyn, konata voĉo de la Esperanta sekcio de Pola Radio. Aŭtoro de multaj lernolibroj. Eksprezidanto de PEA. Membro de Akademio de Esperanto.

Al ambaŭ honorigitaj „famuloj” de pola esperantista movado ni tutkore gratulas.

Pola Esperanto—Asocio

Inter 4 (kvar) venintaj solvoj de la krucvortenigmo, aperinta en la 1a numero de PE (ĉiuj bonaj) ni lotumis por unu persono la libron „La Zamenhof-strato” de Roman Dobrzyński. La feliĉa gajninto estas sinjorino Hanna Skalska el Kielce. Ni gratulas kaj sendas la libron. ♣

La 30an de oktobro, 2005 en Bydgoszcz forpasis unu el la plej konataj polaj esperantistoj

kol. Ryszard Grzębowski

travivinte 49 jarojn. Dum pli ol 30 jaroj Li okupiĝis pri Esperanta turismo (estis honora membro de Monda Turismo), estris la klubejon Esperanto. Li estis ankaŭ kunposedanto de la firmao Espero.

Ni kondolencas al ĉiuj familianoj kaj amikoj de Ryszard.

Estimataj Gesinjoroj!

Mi estas unu de viaj legantinoj kaj samtempe laboras ĉe malgranda pola eldonejo, Waneko, kie preskaŭ ĉiutage mi kun geamikoj interparolas Esperante.

Lastatempe ni eldonis pollingve la libron „Okruhcy Japonii”, kaj ni esperas, ke ĝi povus montriĝi al vi interesa. La libro konsistas el multaj artikoloj, kies aŭtoroj estas ĉefe esperantistoj - poloj, japanoj kaj aliaj eksterlandanoj, iamaniere ligitaj kun Japanio. Nature en multaj tekstoj oni ofte mencias pri Esperanto kiel movado, vivstilo kaj kiel normala lingvo. Ni esperas, ke tio almenaŭ iomete atestos, ke E-o ne estas nur artefarita komunikilo multe malpli utila ol la angla.

Se vi emus ĵeti rigardon al la kovrilo kaj kolorajn paĝojn, ni invitas al:

www.waneko.pl/i.php?v=okruhcy_japonii/okruhcy
amike

Martyna Taniguchi
el varsovia eldonejo WANeko
waneko@waneko.pl

Pelplinanoj en Litovio

Pelplino estas urbo norde de Pollando. Ĉe la tiama lernejo numero 1 jam de sep jaroj funkcias la popola ensemblo „La Cejanoj” („Modraki”), kiu popularigas folkloron de kociavia regiono. La edzino de la lernejdirektoro – Jadwiga Wasiuk - de tri jarojn metas tiun ensemblon en la programojn de la Internaciaj Esperanto-Printempoj.

Iom post iom la grupo prezentis ne nur kociavian folkloron, sed ankaŭ famajn Esperantajn kantojn.

La gesinjoroj Wasiuk decidis premii la geknabojn organizante por ili ekskurson al Litovio. Ili uzis la kontaktojn kun pola lernejo en Jaszuny– kie ni plejparte tranoktis. La datoj koincidis kun la UK en Vilniuso. Oni elektis por ili tre interesan marŝruton: Troki – Kowno – Rumszyszki – Kiejdany– Palanga – Kłajpeda – Kretynga. La gejunuloj vizitis kaj koncertis en preĝejoj aŭ eĉ simple surstrate. Kie ili aperadis, tuj kolektiĝadis publiko. Ĉe Ostra Brama la koncerton ekvidis ankaŭ multaj esperantistoj, kiuj preskaŭ devigis nin veni al la kongresejo.

La sekvontan tagon ni simple ekstaris ĉe la enirejo de la kongresejo kaj kantis. Venis multaj kongresanoj kaj ĉiuj admiris la ensemblon. Feliĉe ni ankaŭ havis okazon koncerti dum la Infana Kongreseto kaj la Lingva Festivalo. Dum la unua ĉiuj infanoj havis grandegajn okulojn – ja estis kolore, laŭte, vige, alie. Do tre interese.

En Kaŭnaso la publiko jam estis

pli postulema: krom loĝantoj spektis la grupo de intruistoj de Esperanto. Sed ankaŭ ili eksilentis kaj admiris la geknabojn. Post la koncerto venis multaj el ili por fari fotojn kun la ensemblo kaj babili.

Kaj pri la lasta: la grupon ĉi-tempe partoprenas 31 gejunuloj (de 8 ĝis 17-aĝaj) kaj 4 maturaj personoj por ludi la muzikinstrumentojn. Neniu devigis ilin lerni Esperanton. Ili mem dum la vojaĝo petis, demandis...Unu muzikisto mem decidis lerni ĉiutage po unu frazo; dua postulis la plej efektivan metodon de lernado. La gejunuloj diris: „Vi dum la vojaĝo estis kelkaj por traduki, kaj ja ni ĉiuj samtempe deziris interparoli – estis ja tiom multaj interesaj personoj!”

Dum la Infana Kongreseto samaj kelkfoje demandis, ĉu la etuloj vere interkompreniĝas uzante Esperanton. Ĉiuj vidis, ke Esperanto ofertas al ili multajn eblecojn, kaj pro tio jam ili komencis lerni. Ĉe la lernejo estas iom pli aĝaj knabinoj, kiuj iam apartenis al „La Cejanojn”. De kelkaj jaroj ili jam provas paroli Esperante. Ili mem elektas modernajn kantojn kaj devigas s-inon Wasiuk ek trovi Esperantajn vortojn. Aŭguste ili kantis en Olsztyn por dumila publiko kun Don Wasyl lian kanton – li romane kaj pole, ili Esperantlidge.

Karaj samideanoj! Maje en Pelplino s-ro Handzlik demandis al la publiko, kion povas oferti la esperantistaro al Eŭropa Unio. Mi sekvontfoje respondas: Ĉiu esperantisto faru ion en sfere, kie oni scipovas fari bone. La rezulto certe estos mirakla!



„Bona Spirito” en kastelo

En la regiono de Pomerio estas urbo kun belega kastelo. En ĝia rozĝardeno kreskas vinberujo. Ĝi devenas de la plej maljuna vito de Eŭropo - el la slovena urbo Mariboro. Enplantis ĝin esperantistoj el Slovenio, kiuj gastis ĉi tie.

Nia urbo nomiĝas Malborko. En ĝi multe okazas dank' al la Esperanto-Rondo „Kastelo”, gvidata de ĝia fondinto kaj prezidanto (nun ankaŭ vicprezidanto de PEA) – Eduardo Kozyra. Lia energio, persisteco kaj entuziasmo en agado donis forton al la „Kastelo”. Malborko fieras pro la mondrekorda nombro de ZEO-j. Ni jam havas 32 da ili – interalie: „Parko de la Mondo” sur „Skvaro Esperanto” ĉe la „Placo de Ludoviko Zamenhof”. Dank' al tio ni ligis amikecajn rilatojn kun esperantistoj de aliaj mondflankoj kaj el aliaj partoj de Pollando.

Nian „Kastelon” gardas „Bona Spirito”, kiu de tempo al tempo aperas kiel homo „el sango kaj ostoj”. Li ĉiam estas en Malborko, kiam io interesa okazas ĉi tie, sed foje li venas nur por helpi nin en la lernado de Esperanto.

Li estas perfekta observanto, preteratentas neniujn gravajn E-aranĝojn de la Rondo „Kastelo” kaj urbajn eventojn. Surbaze de ili li faris belan filmon „Sieĝo de Malborko”. Dank' al la filmo nia esperantista rondo kaj la urbo mem estis kelkfoje prezentita en la Pola Televido kaj en la TVP „Polonia”. La filmo montras, ke nia urbo estas sieĝata de esperantistoj, kiuj alvenas al Malborko por renkontiĝi kun nia E-Rondo „Kastelo”.

Plej ofte ili venas laŭ speciala invito de nia prezidanto Eduardo Kozyra. Tiamaniere vizitis Malborkon industriisto de malproksimo – el Japanio, la granda amanto de Esperanto – Etsuo Miyoshi. Li plantis en la Parko de la Mondo ĉerizujon, inaŭguris la E-memorŝtonon kaj deklaris fondi en Malborko fabrikon. Li ripetis tiun deklaron en alia filmo de nia „Bona Spirito”. La filmo havas titolon „Muroj de Jarmiloj” kaj raportas pri Pekina Universala Kongreso de Esperanto 2004.

La 11an de marto 2005 malborkaj esperantistoj organizis en la mezepoka teŭtona kastelo antaŭpremieran spektaklon de la filmo por ĉiuj loĝantoj de nia urbo.

La filmo same kiel antaŭa filmo estis emisiita en Pola Televido TVP1. La spektantoj aplaŭdis la filmon kaj komprenis kiel granda afero estas Esperanto. Ili komprenis, kiel grandan promocion ĝuas Malborko dank' al aktivado de nia Rondo. Tio estas reklamo por nia urbo kaj promocio de la Parko de la Mondo.

Post la projekcio de la filmo, la „Bona Spirito” restis en Malborko kaj gvidis kurson de Esperanto. Tio estis rapida kurso: „Esperanto dum sep tagoj”. Je la fino li donacis al nia klubo filmon „Mazi en Gondolando”, laŭ kiu li gvidis la kurson.

Dank' al la filmo niaj lecionoj estas nun pli interesaj kaj la partoprenantoj pli aktivaj. Ili pli rapide lernas.

La 20-21an de julio okazis grava E-aranĝo en Malborko. La deputito al la Eŭropa Parlamento, Margareta Handzlik – eminenta esperantistino ↵

✍ – plantis en la Parko de la Mondo ar-
beton, la kverkon de „Eŭropa Unio”
kaj inaŭguris E-memorŝtonon. Ĝi estis
laŭvica 32 ZEO. Alvenis ankaŭ nia ami-
ko Etsuo Miyoshi. Ĉiuj esperas, ke li
baldaŭ anoncos la definitivan decidon
pri la industria investo en Malborko.

Venontan someron ni planas tri no-
vajn ZEO-jn de tri eŭropaj minorita-
toj: arbojn kaj E- memorŝtonojn de ro-
maoj, soraboj kaj judoj, reprezentos
ilin eminentaj espetrantistoj ekz. as-
trofizikisto prof. d-ro Amri Wandel el
Usono/Israelo kaj sorabisto prof. d-ro
Edward Wornar el Germanio.

Kaj la „Bona Spirito”? Jes, li cer-
te ankaŭ venos kaj tutcerte plu gardos
nian „Kastelon”.

**Malborka esperantistino
– Vinjo Maciejczak**

PS. Divenu, kiu estas nia „Bona Spi-
rito”.



Urbestro de Zagrebo partoprenis Zamenhof-tagan feston

Esperanto-Societo „Bude Borjan”
pripensis kiel festi Zamenhof-Tagon en
2005. Ni decidis provi enmeti la libron
„Zamenhof-Strato” de R. Dobrzyński
en la televidan elsendon pri la plej multe
aĉetataj libroj. Tiucele pluraj membroj
decidis samsemajne aĉeti la libron en la
librovendejoj ĉe kiuj certa TV-progra-
mo kutimas mezuri la interesiĝon de la
publiko. Niaj membroj ja posedas tiun
libron ĉar ni aĉetis ĝin etpreze antaŭ ol

ĝi aperis per antaŭpago. Nun ni decidis
investi en plian libroaĉeton ĉe publika
loko, sen rabato.

Rezulto de la unua semajno: „Za-
menhof-Strato” aperis en la kroata
gazeto „Večernji list” de la 21-a de no-
vembro je la 4-a loko el 5 eblaj lokoj.



Zagrebaĵ esperantistoj festis la
ĉijaran tagon de la Esperanta libro la
7an de decembro en la librovendejo
Profil, prezentinte al la zagreba publi-
ko „Zamenhof-Strato” de Roman Do-
brzyński. La urbestro de Zagrebo s-ro
Milan Bandić ĉeestis la feston kun estro
de la zagreba kulturfako Pavle Kalinić.
(La urbestro alvenis post kiam Kroata
Esperanto-Ligo sendis al li la koncernan
kroatan libron kun la informo pri tra-
dukoj de la libro plurlingven kaj kun la
invitilo por la librolaŭdo. La libro estis
sendita ankaŭ al pluraj politikistoj. Pre-
zidento de Kroatio s-ro Stjepan Mesić
dankis letere pro la donacita „Zamen-
hof-Strato”).

Pri la libro „Zamenhof-Strato” pa-
rolis eldonisto Damir Mikuličić kaj tra-
dukisto Domagoj Vidović. Fragmentojn
el la libro legis Vida Jerman. Spomenka
Štimec prezentis la tutan projekton pri
tradukado de „Zamenhof-Strato” en
aliajn lingvojn. Estis ekspoziciitaj la ja-
pana, litova, pola, Esperanta, kroata kaj
ĉeĥa eldonoj. Estis anoncita la slovena
eldono kiu aperos venontsemajne en
Maribor, kaj slovaka eldono kiu aperos
venontmonate en Martin.

Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Espe-
rantistoj anoncis, ke la kroata traduko
de la libro aperos en 2006 en surben- ✍

GRANDA VERKISTO KAJ ESPERANTISTO FORPASIS

Unu el la plej gravaj kaj popularaj ĉinaj verkistoj de la 20a jarcento, la veterana esperantisto Bakin (Ba Jin; origine Li Feigan) forpasis la 17an de oktobro 2005. La 25an de novembro li estus 101-jara.

Bakin aktivis en la Esperanto-movado ekde la 1920aj jaroj, kiam li ankaŭ tradukis el Esperanto al la ĉina verkojn de E. Amicis, A. Tolstoj kaj Akita Ujaki. En 1932 li ĉinigis la romanon „Printempo en aŭtuno” de Julio Baghy. Ĝi forte tuŝis lin kaj inspiris lin verki ĉinlingve sian propran romanon „Aŭtuno en la printempo”, kies



↙ digita formo en eldonejo por surbendigitaj libroj ĉe Blindulasocio. Estis menciite, ke oni tradukas la libron krome en la portugalan, en la latvan kaj estonan kaj ke la hungara kaj rusa tradukoj serĉas siajn eldonistojn. Estas preparata la franca, itala kaj ukraina tradukoj. Germana Esperanto-Asocio esploras la eblecojn eldoni la libron germane.

Kroata TV filmis pri la evento, aparte interesigante pri la personeco de la Nepo Zamenhof. Familia radio elsendis pri ĝi.

La ĉijaran zagreban Zamenhof-tagan feston partoprenis 60 ĉeestintoj inkluzive reprezentantojn de Pola Ambasadego en Zagrebo, al kiuj estis donacita pola ekzemplero de la libro.

Spomenka Ŝtimec

Esperanta traduko aperis en 1980. En Esperanto aperis ankaŭ liaj romanoj „La familio” kaj „Frosta nokto”.

Bakin faris gravajn servojn al la ĉina Esperanto-movado, i.a. kiel prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kies honora prezidanto li estis. Dum la „kultura revolucio” en la 1960aj jaroj li estis kruele persekutata kaj publike humiligata kiel „kontraŭrevoluciulo”, sed post la restarigo de normalaj kondiĉoj li okupis gravajn sociajn funkciojn, i.a. kiel vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco.

En 1981 li fariĝis prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio. En 1981 Bakin estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis membro de la Honoraj Komitatoj de ambaŭ Universalaj Kongresoj okazintaj en Pekino, en 1986 kaj 2004.

En sia kondolencna mesaĝo okaze de la forpaso de Bakin, la prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti skribis:

„Kelkaj homoj estas pretertempaj kaj preterlokaj. Tiaj estas laŭ mi la grandaj homoj, kies instruoj daŭre restas en la mondo, kiel ekzemple Gandhi aŭ Zamenhof aŭ multaj aliaj, kiuj estas prave rigardeblaj kiel niaj samtempuloj aŭ prefere ĉiu-tempuloj, ĉar ili pludivas inter ni per siaj pensoj, kiuj daŭre influas nin preter la tempo kaj la loko, en kiu ili vivis. Sinjoro Bakin, aŭ Li Feigan, estas tia por la esperantistoj”.

fonto: RET-INFO

Privilegio

Estas privilegio, ke ni povas aparteni al diversaj E-organizoj kaj aparta avantaĝo, ke nun – kiam ne plu ekzistas la „devizaj” problemoj – eblas fari tion tiel facile!

ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj invitas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri progresado de Eo, pri diversaj aspektoj de E-instruado, internaciaj edukprojektoj, gvidado de kursoj kaj de lingvaj klubaj okupoj, pri kursoj por instruistoj, Eo en EU kaj alia varia agado.

Membrokotizo por 2006:

54 zł – kun papera Internacia Pedagogia Revuo kaj abono de ĉiuj mesaĝoj de la Novaĵservo de la Pola Sekcio de ILEI speciale redaktataj por la membroj (iuspeca elektronika gazeto kun i.a. informoj pri la aktuala diversflanka agado de la pola ILEI, kun gravaj informoj venantaj el la lando kaj mondo, kaj tuŝantaj diversajn temojn, kun anoncoj pri aranĝoj).

18 zł – kun elektronika IPR kaj ĉiuj mesaĝoj de la Novaĵservo de la Pola Sekcio de ILEI.

Atentu: la membroj ricevas Internacian Pedagogian Revuon kaj abonon de la Novaĵservaj informoj sen kroma pago.

ILEI-membroj povas aĉeti: **Esperantaj sinonimoj**. *Jaan Ojalo*. UEA. Rotterdam. 1999 (3a, korektita eld). 96 paĝoj, 1925 kapvortoj, indekso kun ĉ. 5500 vortoj. Prezo: 25,50 zł

ABONOJ por ĉiuj

JUNA AMIKO!

– tre ŝatata kvaronjara revuo, instrua kaj amuza + retejo. Interesaĵoj, kantoj, ludoj, legaĵoj kun ekzercoj, preparado por E-ekzamenoj, rubrikaj – i.a. pri popol-kutimoj. Abonprezo por 2006: 39,50 zł.

Petu senpagan specimenon ĉe MagdalenaTatara.

***Mi estas juna
kaj mi havas
junan amikon!!!***

Jadwiga Gibczyńska
esperanta aktorino

SCIENCA REVUO

– tre interesa, kvaronjara revuo kun diversdomenaj artikoloj. Helpas plilarĝigi sian konon de la vortoj koncernantaj diversajn domenojn. Abono por 2006: 49,00 zł.

Ĉiujn pagojn oni sendu per poŝtmandato al: Magdalena Tatara, 32-020 Koźmice Wielkie 323, k/Wieliczki.

Eblos pagi ankaŭ dum Krakovaj E-Tagoj, sab., la 10an de decembro, al Maria Majerczak (vespere) aŭ Magda Tatara.

Informoj ĉe Magdalena Tatara, tel. (012) 250 14 79 aŭ Maria Majerczak, tel. (012) 638 14 49.

Rondo de Junaj Ĵurnalistoj- Esperantistoj

Ni prezentas la Rondon de Junaj Ĵurnalistoj-Esperantistoj en Krakovo, agantan ĉe la loka universitato ekde nov. 2004.

MEMBROJ:

– 10 talentaj amatoraj kaj 2 profesiaj ĵurnalistoj, studentoj aŭ diplomitoj de Jagelona Universitato en Krakovo,
– E-parolantoj krom unu profesia ĵurnalisto, Magdalena Jamka, kiu tamen komprenas E-on kaj kiu eniris la grupon por funde studi la tre interesan por si temon: 'Pasporta Servo'.

AĜO:

19–27 jaroj, du membroj estas iom pli ol 30-jaraj.

CELO:

- verkadi kaj publikigadi plejparte nacilingvajn artikolojn pri Eo,
- transdonadi al la amaskomunikiloj informojn pri la lingvo, ties funkciado, kulturo ktp., prelegi. La grupo kunlaboras kun la oficialaj polaj amaskomunikiloj. Post iom da necesa praktiko ĝi – espereble! – ekkunlaboros kun la Novaĵservo de la Pola Sekcio de ILEI.

KVALIFIKOJ

La membroj konstante informiĝas pri ĉiuj aspektoj de Eo, i.a. pri ties nuna situacio kaj atingoj. Ili tre aprezas la eblecon akiri gravajn diversdomenajn profesiajn sciojn pri Eo dum studado en la E-fako de Poznań.

Kelkaj el ili finstudas/nun ekstudas/intencas studi en tiu fako.

AVANTAĜOJ

Ĉiuj neprofesiuloj en la grupo debutas ĵurnalisme ĝuste en ĉi tiu Esperan-

ta rondo, en kiu - danke al serioza studado, lernado de principoj de verkado kaj tuja kunlaboro kun 'veraj' gazetoj k.a. komunikiloj - ili trovas la valoran eblecon gajni ĵurnalistan sperton.

En la rondo oni povos fari oficialan (devigan por iuj studentoj) staĝon. La rondo baldaŭ kontaktos la koncernatajn universitatajn institutojn por proponi tion. La staĝanoj-neesperantistoj studus pri Eo kaj kontribuos al la verka kaj publikiga agado. Estas preparota por la edukado de ĉiuj aktivuloj speciala tekstaro.

La rondo esperas ekhavi sian retpaĝon venontjare. Aperados tie la plej bonaj artikoloj kun esperantlingvaj tradukoj.

Maria Majerczak
gvidantino de la rondo

JARFINAJ aranĝoj en Krakovo, Pollando

1. Internacia KURSO PRI ESPERANTO-INSTRUADO por instruemoj kaj instruantoj sen metodika preparo + internacia esperantista REĜA SILVESTRA BALO sur la krakova Ĉefplaco, la plej granda mezepoka placo de Eŭropo.

2. Internacia turisma kaj amika JARFINA RENKONTIĜO kaj internacia esperantista REĜA SILVESTRA BALO sur la krakova Ĉefplaco!

Dato de ambaŭ aranĝoj:
27 dec. 2005 – 2 jan. 2006.

Informoj ĉe:

Novajĵservo de Pola Sekcio de ILEI
piotr.esp@gmail.com

Nova Sekretario por la Centra Oficejo

La posteno de oficeja sekretario en la Centra Oficejo de UEA restis vaka post la emeritiĝo de s-ino Atie van Zeist en majo ĉi-jare. Intertempe la Ĝenerala Direktoro de UEA dungis por tiu posteno s-ron Ralph Schmeits, kiu eklaboros la 1an de novembro. S-ro Schmeits estas 26-jara aktivulo de Nederlanda Esperanto-Junularo. Kun unujara kontrakto li deĵoros kvar tagojn semajne. S-ino van Zeist plu helpas pri sekretariaj taskoj kiel volontulo unu tagon semajne.

Nova membrakarto de UEA enkondukita

La Centra Oficejo de UEA komencis liveri al la novaj membroj de la Asocio novstilan membrakarton. Temas pri kreditkartformata, plastumita kaj kolora karto, kies dezajno estas inspirita de la interreta hejmpaĝo de UEA. La unuan ekzempleron de la karto ĝenerala direktoro Osmo Buller transdonis al prezidanto Renato Corsetti dum sia laborvizito al Florenco la 18an de novembro. Krom la novaj membroj de UEA, la novstilan karton ricevos inter la unuaj ankaŭ la komitatanoj de UEA kaj TEJO kaj la membroj de Societo Zamenhof.

fonto: „Ret-Info“

La berlina Esperanto-domo estas rekonstruota

La berlinaj esperantistoj ne perdis la esperon: post la katastrofa fajro en septembro oni jam planas la rekonstruon de la domo. Johann Pachter, la posedanto de la domo, komisiis inĝenieran oficejon pri la teknikaj planistaj laboroj. Krome Peter Kühnel, esperantisto kaj konstru-inĝeniero, transprenis la taskon de konsilanto kaj kunordiganto de la laboroj. Ili planas, ke la Berlina Oficejo de Germana Esperanto-Junularo kaj la kvin loĝejoj estos denove uzablaj fine de decembro 2005. Necesas prokrasti la renovigon de la korta domo.

Ĉar la ĉefdomo bezonas tute novan tegmenton, oni pripensas pligrandigi la uzeblan spacon en la tegmenta etaĝo per pli alta kaj malpli klinita tegmento kaj/aŭ grandaj tegmento-fenestroj (germane: Gauberi), se tion permesos la urbaj aŭtoritatoj. Tiel oni gajnos multe da spaco: por la Germana Esperanto-Arkivo, por la Espoteko, por kunvenejo kaj por pasportserva ĉambro. La domo havus kvar plenajn etaĝojn: teretaĝon, du pliajn etaĝojn kaj tegmento-etaĝon. La tegmentoetaĝo estu preta meze de 2006.

La 7an de novembro je 19:30 okazis en Kafejo Multi-Kulti (Schönfliesser Strasse 7) prelego de Johann Pachter kaj Peter Kühnel pri la nuna stato kaj perspektivoj de la Esperanto-domo en Lichtenberg. Sekvis vigla diskuto.

**Robert Weemeyer
el Berlina E-Infomilo, 11/2005**

fonto: „Ret-Info“

Kvizo

1. Kiu kristana preĝo troviĝis en la Unua Libro?
 - a. Patro Nia
 - b. Ave Maria
 - c. Apostola Kredo
2. Kiel nomiĝas la plej malnova revuo en Esperanto?
 - a. Dia Regno
 - b. Dio Benu
 - c. Espero Katolika
3. Kiu preparis la unuan plenan Esperantan tradukon de la Sankta Biblio?
 - a. Ludoviko Zamenhof
 - b. Kazimierz Bein (Kabe)
 - c. ekumena biblia komitato
4. En kiu jaro katolikaj esperantistoj ricevis unuan oficialan permeson de episkopo por organizi sanktan meson kun prediko en Esperanto?
 - a. 1906
 - b. 1964
 - c. 1970
5. Kial sankta Maksimiliano Kolbe estas patrono de katolikaj esperantistoj?
 - a. ĉar li bone parolis Esperanton
 - b. ĉar li celebris sanktan meson dum UK en Varsovio en 1937
 - c. pro lia pozitiva rilato al Esperanto
6. Ĉu poldevena Mariavita Eklezio permesis okupiĝi pri Esperanto?
 - a. nur kun speciala permeso de episkopo
 - b. tio estis granda peko
 - c. ĝi faris provojn disvastigi Esperanton inter ĉiuj kredantoj
7. En kiu jaro esperantistoj ricevis la unuan papan benon?
 - a. 1888
 - b. 1906
 - c. 1997
8. Kiu papo estas oficiala sankta patrono de esperantistoj?
 - a. Pio la X
 - b. Benedikto la XV
 - c. Johano Paŭlo la II
9. En kiu jaro Johano Paŭlo la II komencis uzi Esperanton dum la beno „Urbi et Orbi”?
 - a. 1978
 - b. 1980
 - c. 1994
10. Ĉu katolikaj esperantistoj povas libere organizi sanktajn mesojn en Esperanto?
 - a. jes, ĉiam
 - b. kun specialaj kondiĉoj
 - c. nur kun konsento de papo
11. En kiu jaro Vatikana Radio komencis elsendojn en Esperanto?
 - a. 1976
 - b. 1989
 - c. 2004
12. Kiu inter la famaj esperantistoj estis katolika pastro?
 - a. Antoni Grabowski
 - b. Edmond Privat
 - c. Andreo Cshe
13. En kiu pola urbo troviĝas fondita de esperantistoj preĝeja vitralo?
 - a. Varsovio
 - b. Krakovo
 - c. Olszanka
14. En kiu pola urbo troviĝas gvidata de baptisjoj religia biblioteko kie oni povas trovi ankaŭ librojn en Esperanto?
 - a. Vroclavo
 - b. Malborko
 - c. Gdansko
15. Kiun komitaton prezidis episkopo Władysław Miziołek?
 - a. por traduko de Sankta Biblio
 - b. por traduko de Meslibro
 - c. por anstataŭigi latinon per Esperanto

La supra kvizo rilatas al la libro de Katarzyna Tempczyk, „Czy święci mówią w esperanto?” (Ĉu sanktuloj parolas Esperanton?). Traleginte ĝin vi povos senprobleme respondi ĉiujn demandojn. Sendu solvojn ĝis la 20a de januaro 2006. Inter bone respondontaj legantoj ni lotumos la premion: la libron mem!

[red]

Ŝtata televidĉeno el Pollando iĝas partnero de Internacia Televido ĉe Ĝangalo

Telewizja Polska (TVP), grava ŝtata televidĉeno de Pollando, kun pluraj televidkanaloj kaj abunda produktado de programoj plej diversaj, fariĝis partnero de Internacia Televido, dank' al la sukcesaj kontaktoj de la pola reprezentantino de ITV, s-ino Teresa Liberska. TVP estas unu el la plej grandaj televid-produktantoj de Pollando, kaj tre aktivas ĉe la landa kino-sektoro.

La partnereco de TVP kun Internacia Televido ebligas al la esperantista televidkanalo prezenti kelkajn el la plej bonaj filmoj, programoj kaj dokumentarioj produktitaj en Pollando lastatempe. Temas pri elstara atingo por Esperanto, kaj tre bona novaĵo por la publiko de ITV, kiu baldaŭ ĝuos la bonege faritajn programojn el Pollando, en la lingvo internacia.

La administracio de TVP disponigis centojn da filmoj, dokumentarioj, televidserioj kaj programoj al Internacia Televido. La unuaj 13 programoj jam poŝte survojas al la sidejo de ITV, en San-Paŭlo (Brazilo). „Estas revolucia la fakto, ke grava televidĉeno el ne malgranda lando kiel Pollando rigardas al televidkanalo en Esperanto kun respekto kaj aprezado. Internacia Televido ĵus naskiĝis, kaj ĝi jam sukcesas malfermi novajn horizontojn por la lingvo internacia!”, jubilas Flavio Rebelo, la direktoro de la esperantista televidkanalo.

Redakcia artikolo ĉe
<http://internacia.tv>

fonto: „Ret-Info”

Malica hakero provis forviŝi retejon de Internacia Televido

Merkrede, la 30an de novembro la retejo de Internacia Televido ĉe la portalo Ĝangalo estis atakita de fhakero, kiu forviŝis ĉion en la servilo de ITV.

Krom la tuttaga neatingebla de la televida retejo la atako tamen ne kaŭzis pli grandan damaĝon, danke al antaŭaj problemoj de Ĝangalo kun fhakeroj, kiu igis la teamon de ambaŭ iniciatoj havi laborprocedon por rapide reaktivigi la retejon.

„...Ne estis la unua fojo, ke retejo de la konzerno CIDKON (la entrepreno, kiu administras la portalon ‘Ĝangalo’ kaj la rettelevido esperantista ‘Internacia Televido’) havis problemojn kun fhakeroj. En sia preskaŭ 3-jara historio, oni provis damaĝi al Ĝangalo kvar fojojn. La plej serioza el tiuj atakoj lasis la plej grandan esperantistan portalon for de la reto dum 4 tagoj” - informis la teamo de ITV-Ĝangalo. - La administracio de Internacia Televido pardonpetas al ĉiuj, kiuj volis spekti la esperantistan televidkanalon en ĉi tiu merkredo. La teknikistoj de la televidkanalo nun jam ĉion reinstalis”.

Nia Zamenhof en parolado dum la 2-a UK Genevo-1906 profetis: „Venos iam la tempo, kiam Esperanto... perdos sian karakteron idean; tiam ... oni nur tirados el ĝi profiton...”.

Ni aŭguras profitema kaj dŭxra la sukceson de „Internacia televido”!

laŭ mesaĝo de Ro. Sartoro
redaktoro,
Bonaera Ĝangalo-redakcio

fonto: „Ret-Info”